

MEGYEI KÖNYVTÁR
SZEKSZÁRD
14-66

HUNGARA VIVO

LITERATURA-ARTA REVUO

I
1976
8-Ft.

LA PERANTOJ DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 6,— Usonaj dolaroj, aŭ egalvalora sumo en alia valuto

AUSTRIO: GLOBUS (VAZ) Höchstädtplatz 3, 1200 WIEN XX.,

AUSTRALIO: C.B.D. LIBRARY AND SUBS. SERVICE, Box 4886, G. P.O. SYDNEY, N.S.W. 2000

COSMOS BOOKSHOP, 145 Ackland Street, ST. KILDA 3182 READ AND CO., 694—696 George Street, SYDNEY N. S.W. 2000

BELGIO: AGENCE MESSAGERIE DE LA PRESSE, 1 Rue de la Petit-Ile 1070 BRUXELLES

OFFICE INTERNATIONAL DE LIBRAIRIE S. A., Avenue Marnix 30, 1050 BRUXELLES

BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY LTDA, Caixa Postal 7943, 0100 SAO PAULO

BRITIO: BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 140 Holland Park Ave., LONDON W11 4UF

COLLET'S HOLDINGS LTD., Denington Estate, WELLINGBOROUGH, Northants NN8 2QT

THE DANUBIA BOOK COMPANY, 58. Chatswort Road, LONDON NW2 4DD

BULGARIO: DIREKZIA REP, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: MAĎARSKA KULTURA, Narodni Třida 22, 115 66 PRAHA I.

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tisku, Vinohradská 46 PRAHA

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tlace, Leningrádská 14, BRATISLAVA

ĈINIO: CNPICOR, P.O.B. Nr. 88, PEKING

DANLANDO: MUNKSGAARD'S BOGHANDEL, Norregade 6, 1165 KOBENHAVN K.

FINNLANDO: AKATEEMINEN KIRJAKAUPPA, Keskuskatu 2, 00100 HELSINKI 10.

FRANCIO: AGENCE LITTERAIRE ET ARTISTIQUE PARISIENNE, 23 Rue Royale, PARIS 8.

SOCIÉTÉ BALATON, 12 Rue de la Grange Bateliere, 75 PARIS IXe

G.D.R.: ZEITUNGSVERTRIEBSAMT, Strasse den Pariser Kommune 3—4, 1004 BERLIN

G.F.R.: VERLAG Hans LEIPNITZ, Hölderlinstrasse 10, 6 FRANKFURT 1.

H.W.E. SAARBACH GMBH, P.O.B. 101610, 5 KÖLN 1.

HINDIO: NATIONAL BOOK AGENCY PRIVATE LTD., 12 Bankim Chatterjee Street, CALCUTTA

ISRAELO: LEPAC LTD., 15 RAMBAM Str., TELAVIV

ITALIO: LIBRERIA COMMISSIONARIA SANSONI, Via Lamarmora 45, Casella Postale 552, 50121 FIRENZE

SO. CO. LIB. RI., Piazza Margana 33, 00186 ROMA

JAPANIO: MARUZEN CO. LTD., P. O. Box 5050 TOKYO INTERNATIONAL, 100—31. NAUKA LTD., 2—30—19 Minami-Ikebokoro, Toshima-ku, TOKYO 171.

JUGOSLAVIO: JUGOSLOVENSKA KNJIGA, Terazije 27, BEOGRAD

PROSVETA EXPORT—IMPORT, P.O.B. 555, Terazije 16/1, 11001 BEOGRAD

KANADO: PANNONIA BOOKS P.O. Box 1017, Postal Station „B" TORONTO Ont. M5T 2T8

DÉLIBÁB FILM AND RECORDS STUDIO, 19 Prince Arthur Street west, MONTREAL 130 P.Q.

KOREO: „CHUIL U", PHENJAN

KUBO: INSTITUTO CUBANO DEL LIBRO, Obispo 461, HABANA

NEDERLANDO: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002

NORVEGIO: A/S NARVESENS LITTERATURTJENESTE, Box, 6140, OSLO 6.

POLLANDO: B. K.W.Z. RUCH, ul. WRONIA 23, 00—840 WARSZAWA

RUMANIO: D.E.P. BUCURESTI

D.E.P. ARAD

SOVETUNIO: POCHTAMT—IMPORT, MOSKVA

POCHTAMT—IMPORT, LENINGRAD

SVEDIO: NORDISKA BOKHANDELN, Alströmergatan 22, 101—10 STOCKHOLM

SVISLANDO: AZED AG. Dornacherstrasse 60—62, BASEL 4002

MEROPOLITAN VERLAG, Teichweg 16, 4142 MÜNCHENSTEIN

USONO: FAM BOOK SERVICE, 69 Fifth Avenue NEW YORK, N. Y. 10003

HUNGARIAN BOOKS AND RECORDS, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: LUIS TARCSAY, CARACAS, Apartado 50892

VJETNAMO: XUNHASABA, Phong Phat 166 sor n Hanh Bao Chi, 17 Dinh Le HANOI, RD

Hungaroj ekabonu por eksterlandanoj!

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1976. 1-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: K. Kalocsay
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaki-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon kaj la unuan kaj trian ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la dua ĝis la kvina horo havas akceptotagon.
Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poĉtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

6359 75. 11., Somogy m. Ny. 3000
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XV. jaro 1976. 1-a numero

Numero pri József Lengyel

ENHAVO

Mihály Gergely: József Lengyel, la poeto de la fideleco 1

József Lengyel: Hohem kaj Freier (Tr. *Lajos Tárkony)* 2

József Lengyel: Poemoj (Tr. *Kálmán Kalocsay)* 4

József Lengyel: Antikritono (Tr. *Kálmán Kalocsay)* 5

József Lengyel: Sternekund kaj Reinekund (Tr. *Zsuzsa Varga-Haszonits)* 8

József Lengyel: Respondo al cirkuldemando (Tr. *István László)* 9

Letero al la parlamentanoj 11

Kálmán Kalocsay fariĝis 84-jara *(A. Cs.)* 13

Humphrey Tonkin: Reĝo Lear kaj la universaleco de Shakespeare 14

Panoramo 16

Lajos Tárkony: Revuo de Revuoj 18

Kálmán Kalocsay: Lingvo kaj logiko 19

D-ro *Ferenc László:* Lukto por la viviga akvo (Tr. *Tibor Újlaky-Nagy)* 20

Julius Balbin: La Vorto 26

Humphrey Tonkin: Novjara mesaĝo 27

Recenzoj 28

Leterkesto, Kalendaro 30

Paĝo de FERI' 31

Komforto de la paneloj *(M. F.)* 32

Humuro, Korespondi deziras 32

Sur la titolpaĝo: La scienculo (Mór Korach, akademiano, forpasinta lastjare.)

József Lengyel,

la poeto de la fideleco

Prezenti al la internacia legantaro nacian verkiston estas malfacile. Eĉ se oni tradukis kelkajn verkojn de li en diversajn lingvojn, la plej gravaj trajtoj de lia talento, vivo restas nekonataj.

József Lengyel estis verkisto kun tre valoraj, simpatiaj trajtoj, kiu meritas, ke la internacia legantaro malkovru lin por si mem. Li estis hungaro, sed pro lia humanismo, progresemo, revoluciemo, liaj ĉefaj verkoj estas trezoroj de la nuntempa homaro.

Li naskiĝis en 1896, en 1918 aperis lia unua volumo, ĝi estis poemlibro. Ankoraŭ en tiu jaro li partoprenis ĉe la fondo de Hungara Komunista Partio, kaj en la sekva jaro, 1919, dum la kvar monatoj de la Hungara Konsilia Respubliko laboris kiel ĵurnalisto. Post la malvenko de Konsilia Respubliko ankaŭ li devis elmigri al Aŭstrio, poste al Berlino. De tie baldaŭ, en 1930, li veturis al Moskvo, kie li estis ĵurnalisto, lektoro. „En 1938 laŭ fikciaj akuzoj oni arestis kaj portis lin al internigejo, post la mondmilitli estis ekzilita. En 1955 oni rehabilitis lin kaj en la sama jaro József Lengyel hejmenvenis." (Hungara Literatura Leksikono.)

Do, kiel vi povas vidi, Lengyel travivis eksterordinarajn okazaĵojn, ne ĉiutagajn aventurojn, tre pezajn jarojn, la historio de lia vivo similas al la historio de nia XX-a jarcento. Oni kutimas diri, ke la vivo de multaj homoj estas preta romano, do la vivo de József Lengyel estis granda romano. Kaj estis feliĉo, ke dum la pezaj, teruraj jaroj li restis ĉiam fidela al sia ideo, al la progresa afero de la homaro. Ĉar li havis ne nur talenton, sed ankaŭ grandanimecon kaj saĝon, tial li kapablis paroli pri siaj travivaĵoj en la volumoj aperintaj post 1958 tiamaniere, kiel sukcesis nur kelkaj elstaraj verkistoj. Mi kuraĝas diri, ke la noveloj kaj romanoj de József Lengyel pri la „personkulto" estas eble la plej valoraj, altnivelaj. Li sciis multe pri la homoj, pri la vivo kaj la historio, tial li kapablis kompreni la nekompreneblajn, neakcepteblajn agojn de homoj, la tragikajn ŝanĝojn de la historio. Memkompreneble, kompreni ĉion ne signifis ĉe Lengyel, ke li tion akceptis. Sed verki pri tiuj homoj li sukcesis tiel klare, kortuŝe kaj pensige, ĉar li tute konis la motivojn, cirkonstancojn, nuancojn, laŭ kiuj liaj samsortanoj, sammovaduloj kaj ankaŭ li mem vidis kaj agadis.

Kiam mi povis renkontiĝi kun József Lengyel, fine de 1955, li jam estis maljuna homo, tre modesta, kiu parolis malofte kaj ĉiam mallaŭte. Modeste kaj mallaŭte, sed ĉiam saĝe, ke ni devis atenti je liaj vortoj, kaj ni, junaj kolegoj tuj eksentis, ke alvenis inter nin neĉiutaga talento. Kaj vere post kelkaj jaroj, post kelkaj novaj libroj li iĝis unu el la plej grandaj hungaraj verkistoj.

Ni ne povas prezenti liajn interesajn romanojn, filmojn, sed ni esperas, ke la noveloj, poemoj kaj la dialogo „Antikritono" malkaŝas la originalan talenton, la elstaran kreokapablon de József Lengyel. Li meritas, ke la adeptoj de la internacia lingvo konu kaj ŝatu ĉi tiujn verkojn, ĉar la fidela humanismo, kiu karakterizis de la komenco ĝis la fino lian vivon kaj verkaron, estas simila kaj komuna al nia ideo kaj klopodo.

Li mortis en julio de 1975: kun ĉi tiu numero ni honoras lian memoron kaj vivverkon.

Mihály *Gergely*

József Lengyel

Hohem kaj Freier

La „hohem", la hohem=knabo signifas en la hungara kaj internacia ŝtelista slango oficialan ŝteliston kaj krimulon. La kontraŭpoluso de »hohem«: la »freier« estas la simplanima homo vivanta el sia laboro, iranta sur nekontraŭleĝaj vojoj. La originala senco de la vorto »hohem« estas: akramensa, tiu de la »freier« estas: libera. La »freier« ne scias, ke li estas »freier«, sed tiun alnomon la hohemoj eĉ tiam ne ŝanĝis, kiam ne miloj, sed centmiloj, milionoj da »liberuloj« venis en prizonojn sur multaj partoj de la mondo.

Kial estas ĉi tiu distinga nomdono? Servu klarige ĉi-suba malgranda, prefere biologia ol literatura priskribo, kies vera loko estus eble en kompletiga volumo de la granda Brehm.

La nove veninta prizonul-ekspedaĵo renkontiĝis kun la hohemoj la unuan fojon en la »dividejo«. La freieroj ankoraŭ ne lokis sin en la senfenestra barako kunflikita el lignotabuloj, kiam la hohemoj jam giris ĉirkaŭ ili kiel nizoj. Unu-du poŝoj baldaŭ plimalpeziĝis. Manoj etenditaj el la supraj kuŝbretoj jam delevis kelkajn ĉapelojn de sur la kapoj de la entumultantaj homoj.

Unu el la freieroj, kiu venis ĉi tien el la prizono ŝarĝite per pakaĵoj ĉiaspecaj, eniris la tendaron inter la malantaŭaj venantoj kun du pezaj kofroj kaj kun sako. Sur la korto li renkontiĝis kun homoj fuĝintaj el la barako kaj jam prirabitaj. Ankoraŭ li ne komprenis, kio okazis. De la sojlo li rigardis en la malluman barakon kun okuloj blindiĝintaj de la sunlumo. Aŭdiĝis bruo de tumulto kun krioj. Freier, kun siaj multaj pakaĵoj, turniĝis surkalkane. Li serĉis lokon en la korto, en la proksimo de la alta gardoturo ĉarpentita el traboj, sur la freŝa herbo, kiun ankoraŭ ne surtretis la printempaj homekspedaĵoj. Sidante sur altaĵeto estiĝinta el liaj trezoroj: la du kofroj kaj la sako, li pasigis la tagon. Eĉ por la manĝaĵo li ne iris al la kuirejo.

Estis varma, bonanima, sunbrila majfino. Nur post sunsubiro la vetero fariĝis malvarmeta: Freier tiam eltiris varman peltaĵon el la grandega sako — evidente li intencis tranokti sur la korto.

Hohem el la pordo de la barako rigardis, kiel Freier surprenas sur sin sian peltaĵon, kiel li konstruas kuŝejon el siaj du kofroj, kiel zorgeme, ĝisfine, li butonumas la peltaĵon, kiel li kuŝiĝas sur la du kofroj kaj kiel la vestaĵsakon, ampleksan ankaŭ sen la peltaĵo, li direktas sub sian kapon kiel kusenon.

En la barako estis mallumo, interpuŝiĝo, interpremiĝo. Kiel sur tramo, kiam pro kurta cirkvito estingiĝas la lampoj. Sur la korto estas freŝa aero, kaj, kio estas plej grava — Freier ĝuste pro tio elektis ĉi tiun lokon — sur la transa flanko de la duobla dratplektaĵo sed tamen preskaŭ super lia kapo, en la alta gardoturo ĉarpentita el traboj, staras la gardisto sur unu el la ok gardoturoj ĉirkaŭprenantaj la tendaron. La gardisto seninterrompe rigardas, kio okazas interne de la dratplektaĵoj kaj atentas ĉefe pri tio, ke inter la du dratplektaĵoj, sur tiu nenies tero, nenio okazu. La proksimo de la gardisto trankviligas Freieron.

Fine de majo la tagoj estas longaj. Estis ankoraŭ lume, kiam Freier ekdormis. Ĉe homo laciĝinta de la peniga transportado, daŭranta eble dum monatoj, ne estas mirakle, ke en la herbodora, freŝa aero tuj dormo lin faligas en siajn plej profundajn akvojn.

La nuboj ankoraŭ ruĝis de la rebrilo de la malaperanta suno, sed la spegulaj reflektoroj de la gardoturo komencis balai la tendaron kaj la dratplektaĵojn. Ankoraŭ oni ne sonorigis dormosignalon, kiam la malalt-statura, magra, verdetvizaĝa Hohem — promenante kaj ne rapidante — iris al la dormanta Freier. Li ĉirkaŭrigardis, poste ekkuŝis sur la rando de la mallarĝa kuŝejo formita per la kofroj.

Malmultan lokon li havis apud la granda Freier. Per unu piedo li sin tenis sur la tero. Sed li ne movis preme Freieron. Li kuŝis surflanke, magre kiel klingo, apud la grandega pankorpo de Freier, ankoraŭ pli dika en lia peltaĵo. Eble duonhoron li restis tiel senmove sin alpremetante al la dormanto. La tranĉilo kaj la paneto, la rabobesto kaj lia viktimo varmigis unu la alian per sia korpo.

Kiam tiel, en la vera senco de la vorto, ili intervarmiĝis, Hohem moviĝis. Per facilmova, nervoza mano li trapalpis sian Freieron. Ĝis li elpalpis la monujon en la dekstraflanka pantalonpoŝo de la dormanta homo.

Nature, Freier sciis, ke li ĉiam dormas turnante sin sur sian dekstran flankon, tial li metis siajn valoraĵojn en la dekstran poŝon de sia pantalono. Por Hohem tio estis ridinde ofta, konata kaj tre mallerta defend-eksperimento. Pli mallerta ol tiu de la skarabo, kiu je la vido de malamiko sin ŝajnigas mortinta.

El la faldaĵo de sia jako li elprenis pinglon; Hohem ĉiam portas kun si pinglon, kiel la vitristo ĉiam ĉe si portas sian vitrotranĉan diamanton. De tiu laborilo nur la plej zorga priserĉo povis kelkfoje lin senigi — sed ankaŭ tiam nur por duonhoro. La plej unua najlo, malgranda dratpeco, kiun li levis de sur la tero, kaj kiun sur brikrubo aŭ sur la cementplanko de la ĉelo rapide li pintigis, baldaŭ anstataŭigis la perditan pinglon. Ĝis ŝtalo aŭ fero venis en lian manon, konvenis ankaŭ elpintigita malgranda lignopeco, splito forstreĉita de sur la lignotabulo de la kuŝbreto. Sed nun, kaj preskaŭ ĉiam, li havis veran pinglon, kiu forigas tian obstaklon indan nur al cerbo de skarabo.

Singarde, facilmove, kiel pulo pinĉas, li puŝpikis la dorson de la dormanta Freier.

La dormanta homo per ridetiga malrapideco retroetendis la manon, sin gratis. Eble ankaŭ la gardisto ekridetis...

Tiam la pinglo de Hohem faris duan pulopinĉon. La dormanto denove komencis sin grati, li skuadis la ŝultron, tiradis la dorson, kaj — sen tio, ke li estus vekiĝinta — mekanike sin turnis sur la alian flankon.

La laboro de la pinglo finiĝis. La poŝo, kaj en ĝi la mono, jam ne estis sub la korpo de la dormanto, sed supre, libere, en la manosfero de Hohem. Sed Hohem

restis senmova. Dum bona duonhoro rigidiĝinte li kuŝis apud Freier, ĝis la homo ĝenita en sia dormo denove profunde redronis en la ŝlimon de siaj sonĝoj.

Nur kiam denove ili tiel kunvarmiĝis, tiam antaŭvenis la dua laborilo, kaj nome el la ŝuplandumo. Maldika razoklingo. Hohem per unu sola preciza tiro tratranĉis la peltaĵon. La dua movo: li eltranĉis la poŝon. Per la tria movo la monujo venis en lian manon.

La sekva manovro estis longdaŭra kaj bezonis grandan lerton. Pli ĝuste, ĉi tie, en la prizontendaro, ĝi eĉ ne postulis tiel grandan cirkonspekton... La gardisto, en la lumo de la reflektoroj, rimarkis eĉ la brileton de la malgranda klingo. Tamen li ne ĝenis la laboron de Hohem. Li plenumis ĉi tie unu solan taskon: atenti pri tio, ke neniu povu proksimiĝi al la ekstera, nek al la interna dratplektaĵo, inter kiuj la nenies tero estas dekdu metrojn larĝa. Sur tiu ĉi malpermesita zono eĉ al la herbo ne licis kreski. Estis nigra novalo, kiun ĉiusemajne oni fosigis, erpigis — per prizonuloj eskortataj de aparta gardistaro — por ke ĝi restu glata kaj mola kaj eĉ paŝosigno ne restu sur la erpitaj terlinioj. Post pluvado ankaŭ ekstervice oni prilaboris ĝin. Nu, la gardisto rigardadis nur ĉi tiun malpermesitan zonon. Kio okazis trans la dratplektaĵo, en la tendaro, tio lin interesis nur koncerne al la malpermesita zono. Sed ankaŭ la malpermesita zono nur tiuflanke, kie li staris. Kaj ankaŭ tiu flanko nur dum tiu tempo, dum li servis. Tial oni starigis lin en la gardoturon — kaj prete. La cetero interesis lin nur tiom, kiel la fiŝo naĝanta en la rivero la infanon transirantan sur la ponto. Aŭ eĉ ne tiom, ĉar la infanoj ja vivas kaj ne atendas starante sur posteno, ke ili poste povu vivi...

Hohem bone konis la gardistojn. Tamen, kiel pursanga fakulo, artisto de sia metio, li ne povis ventkapule, senzorge labori. Eble li pensis pri tio, ke ne estas permesate „perdi el la rutino"...

Vagonara ŝtelado estis lia fako, fajna kaj gaja metio. Ĝis la ŝtelito komencas ho-ve-adi malsaĝe, kun miranta vizaĝo, la predo jam ripozas en la tria vagono, ĉe la kolego. La vojaĝantoj de la kupeo kaj baldaŭ de la tuta vagono pritraktas la aferon. Superatutante unu la alian ili divenadas: ĉu nun tio okazis aŭ jam en la nokto? Kiu estis la ŝtelisto? Ĉe kiu stacio li povis elvagoniĝi? Kion oni devas nun fari? Kian depeŝon oni devas sendi? Kaj li trudas seriozecon sur sian vizaĝon kaj kun profundsenca kapbalancado partoprenas en la diskuto: „Nu, certe, en niaj tempoj..." li diras kaj rezigne mangestas... „jes, jes" aprobas la vojaĝantoj kaj faras tiel, kvazaŭ ili komprenus, kian socian kaj etikan veron esprimas lia mangesto...

La razoklingo nun facile trakuris sur la tuta flanko de la vestaĵsako. Sed la plej malfacila parto de la laboro nun komenciĝis. La havaĵojn po unu oni devas eligi el la sako, el sub la kapo de la dormanta homo. Tiel, ke lian dormon nenia tireto aŭ skueto ĝenu. La maldekstra mano de Hohem malrapide profundiĝis en la sakon, samtempe sian dekstran manon, sian polmon li metis sub la kapon de la dormanto. Ne estas tia flegisto, ne estas tia vartistino, kiu per tiel tenera atento tenus, ŝirmus la mallertan kapon konfiditan je ilia zorgo kiel tiu ĉi dekstra mano. Dume la maldekstra mano unu post la alia eltiradas la havaĵon el la sako.

Kiam la unuaj vestaĵpecoj liberiĝis el la sako, tiam el la malluma enirejo de la proksima barako, ia figuro, helpanto de Hohem, elvenis al la korto lumigita de la reflektoroj de la gardisto. Li promenis tien al la du homoj kuŝantaj unu apud la alia kaj komencis la transportadon de la predo.



Malrapide, senvoĉe daŭris la laboro. La ĉefa regulo: ne licas ekscitiĝi, ne licas kaptadi. Fine el la sakoj kaj el la ĉifonoj — kiujn la helpanto tie tuj elektis kaj reĵetis —, Hohem faris kusenon kaj tiun ĉi kusenon li ĉifis sub la kapon de la dormanto. Nur post tio li liberigis sian dekstran manon.

Ankaŭ tio okazis, Hohem iom post iom fortreniĝis de la korpo, per kiu ĝis tiam ili varmigis unu la alian. Li leviĝis de la kuŝejo formita per la kofroj, rigardis la kofrojn, kvazaŭ li volus vidi en ilin. Hodiaŭ ne, sed morgaŭ ankaŭ ili estos lia predo. Poste, komforte kaj iel mishumore, lace li ekiris al la barako.

La reflektoroj de la gardisto tiel akre lumis, ke inter la du dratplektaĵoj ĵetis ombron eĉ la maldikaj, nigraj sulkoj tiritaj per la dentoj de la rastilo.

Hohem pensis pri tio, kiel bone estus nun sinjoradi, starante antaŭ la fervojstacia trinkejo, verŝi en kruĉon da biero glaseton da brando, ĝin bone kirli, eltrinki... kaj grakante, sian gorĝon senraspigante, sed kun firmaj paŝoj, tute ne ŝanceliĝante, nur kun la bona varmo de la trinkaĵo en sia korpo, iri tra la reloj kaj salti sur la ŝtupon de la jam ekirinta trajno.

Eĥ — li ĝemis kaj rigardis al la gardisto. — Eĥ, venos ankoraŭ la tempo de la liberiĝo... „Matene" li kalkulas „la knaboj irantaj al la laboro elportos sub siaj vestaĵoj la pakaĵon. Vespere, en apoteka glacisako, ili alportos la trinkaĵon... Nun estas la dekdua

JÓZSEF LENGYEL

JEN MI ESTAS

Kie la ter', sur kiun la rompitaj branĉoj de mia
korpo povus kliniĝi?
Nenie hum', en kiun miaj fingroj povus fiksiĝi
kvinradike.
Sed ne. Estas mia sorto de mi mem farita kaj
bone tiel.
Jen mi estas, kaj nerompite, eĉ se mi 'stas
senĝoja en la nerompiteco.
Sed kial la stultuloj, kiuj nun al mi hurlas siajn
instigojn?
Ja nerompita mi estas, nerompita, nerompita.
Kio mi dezirus esti?
Ja mi ekzistas, ekzistas.
Ĉu estis malmulte, je kio mi kredis?
Ja ĝi ekzistas, ekzistas.
Ĉu multaj komencoj pluas antaŭ mi?
Mi plenumos ilin, plenumos.
Nur ĉar nerompita mi 'stas, rompita mi volus esti.
Ĉar mia vivo ne gustas bone.
Kaj ĉar neniu estas ol mi pli rompita.

LA SIMPLECO DE LA MOROJ
LAO-CE

Per leĝoj oni regas la landojn,
Per artifiko faras militon.
Per la ne-ago oni povas la landon konkeri.
El kio mi scias, ke tiel estas?
El tio, ke:
Ju pli da baroj kaj prohiboj en la lando,
des pli malriĉa estos la popolo.
Ju pli da armoj estas en la popolo,
des pli maltrankvila estos la lando.
Ju pli eltrovema estas la popolo,
des pli okazas da nekutimaĵoj.
Ju pli da dekretoj kaj leĝoj,
des pli estas da ŝtelistoj kaj rabistoj.

Do jene parolas la sanktulo:
Mi faras nenion kaj la popolo
mem regas sin mem.
Mi amas la trankvilon kaj la popolo
per si mem estos trankvila.
Mi liberas de strebo tumulta kaj la popolo
per si mem riĉiĝos.
Mi estas sen deziroj kaj la popolo
per si mem estos simpla.

EPITAFO

1.
Ĉi kuŝas
Trankvil-nescia
Centpatriulo senpatria
Sian vivon pravigonta
Soifulo vagabonda
Sendormulo songfikcia

2.
Ĉi kuŝas
Trankvil-nescia
Inter saĝaj senracia

Eĉ en neplugatajn semis
Dikulinojn ami emis
Magrulinojn ami emis
Kulpis ĉiel ĉiupeke
Ankaŭ kiel al vi plaĉus
Peki se nur vi kuraĝus

Ridus vi — li ridis ege.

Tr. K. Kalocsay

horo, duonhoro post la dekdua, maksimume duono antaŭ la dua". Liaj manoj, kiuj antaŭe, dum ili laboris, estis tiel trankvilaj, certaj kiel tiuj de operacianta kirurgo, nun estas nervozaj. Liaj fingroj tremas.

Moroze li iras internen en la barakon. Lia kunulo raportas: „La predo estas bona". Sed li ne respondas. Li estas moroza kaj jam denove profesoro, ne alproksimigebla. Li surgrimpas sur la kuŝbreton. Li provas dormi, ke pli rapide pasu la tempo. Nun ankaŭ li ne vivas. Li atendas...

Matene, kiam Freier vekiĝis, nekomprene li gapis al la sako. Poste li kaptis al sia poŝo. Restis nur la loko de la poŝo. Li kuris al la dratplektaĵo, sub la gardoturon.

— Oni prirabis min — li krias al la gardisto... — Ĉu vi ne vidis, kiu li estis?

— Matene je la sesa mi venis — diris mishumore la gardisto. — Ne proksimiĝu al la barilo — li almetis severe, ĉar li vidis, ke Freier volas kapti la draton.

Se Freier ne estas tre stulta, post tio al neniu sin turnus kun plua plendo. Sed kompreneble li ankoraŭ ne estis tiom sperta, li ankoraŭ ne kolektis tiom da kaptittendara saĝo, ke li komprenu: de kiom da zorgoj liberigis lin Hohem dum la nokto. Kaj li ne scias, ke kiam li perdos ankaŭ siajn du kofrojn (ne ĉi-nokte, ĉi-nokte, li vigilos), tiam li estos ankoraŭ pli libera...

Malgranda pakaĵo: kusen-ŝelo, en ĝi ĉemizo, gamelo, kulero, tabako, ĉiam estos ĉe Freier eĉ en la plej malbonaj tempoj. Kvankam dum dek jaroj ankoraŭ oni priŝtelos lin centfoje.

Aliparte — Hohem, se li liberiĝos — aŭ se de tiu laborejo oni portos lin al alia laborejo — vojaĝos ĉiam sen pakaĵo. Antaŭ ol oni eskortos lin tra la pordego de la kamparo de kaptitoj, li forĵetos sian kuleron kaj gamelon. Oni devas forĵeti la kuleron, ĉar la Hohem-superstiĉo opinias, ke kulero portata kun si alportos malfeliĉon. Kiu kunportos la kuleron, tiu revenos al la tendaro. La gamelo estas sendanĝera. Sed por kio servus gamelo sen kulero? Ĉiam oni povas akiri alian.

La faktoj ne konfirmas la superstiĉon. Eĉ, plej ofte ili konfirmas ion alian. La ĉiam kulerhava Freier ne revenas al la kamparo — jam ankaŭ el tiu simpla kaŭzo, ke malofte li liberiĝas de tie vivante. Kaj Hohem — jen fuĝas, jen liberiĝas — kaj kvankam li forĵetas la kuleron, ofte li revenas.

Tr. L. TÁRKONY

József Lengyel

ANTIKRITONO

Antikritono: De post tricent naŭdek naŭ plus mil naŭcent sepdek du, sume dumil tricent sepdek unu jaroj vi portas, ho Kritono, la renomon de sinoferema amiko, de honesta homo akceptanta saĝajn argumentojn.

Kritono: Tiel estas. Kaj firme mi kredas, ke rajte.

Antikritono: Mi ne volas vin senigi de tia via famo, tamen mi eldiras sincere kaj senkaŝe: mi volas malpliigi viajn meritojn rekonatajn ekde jarmiloj, por ke per tio la grandeco de Sokrato staru antaŭ ni en sia tuta vero por la tagoj, jarcentoj aŭ jarmiloj de la futuro. Ĉar la notoj de Platono, pri lia interparolo kun vi, malpliigas la grandecon de Sokrato; kaj tion, mi estas certa pri tio, ankaŭ vi ne deziras.

Kritono: Malpliigi la grandecon de Sokrato mi neniam deziris. Ja, mia bona fido trovas sian firmrokan fundamenton en la grandeco de Sokrato. Aŭ, ĉu pri tio vi volus min riproĉi turpe kaj maljuste, ke mi eniris la prizonon de Sokrato en la tago antaŭ lia morto por logi lin inside en reton?

Antikritono: Mi ne pensas tion, Kritono, kaj kiu ajn dirus tion, eĉ se vi mem prenus sur vin ion tian — timante la pli grandan koleron de la malicaj juĝistoj —, eĉ tiam mi ne kredus pri vi tian aĉan insidemon. Mi ne estas via juĝanto, kaj se mi supozus ion tian, kio do min instigus kun vi paroli? Mi ne akuzas vin, sed strebante kune kun vi al la plej perfekta ekkono de la vero, mi vin demandas: ĉu vi pensas, ke la saĝo de Sokrato estis tiel same neatakeble kristalpura en la frumatena dialogo inter li kaj vi, kiel tiutage, kiam antaŭ la Atenaj juĝistoj kaj la popolo li diris sian apologion?

Kritono: Jes ja, tion mi kredas.

Antikritono: Sokrato staris do ĉiam kaj en ĉio super la plej altaj nuboj de la saĝo?

Kritono: Je Zeŭso mi diras tion.

Antikritono: Tamen, per ĉi tio vi jam restas post Sokrato per unu paŝo, aŭ — kio estas la sama — vi jam lasas lin post vi per unu paŝo ĉar li bone sciis, ke ne ĉion li scias, kaj el la nescio li ekiris al la scio egaltakte kaj konsidereme.

Kritono: Ne uzu la artifikojn de la sofistoj, malestimatajn de Sokrato. Se vi volas, ke mi ne turnu mian dorson al vi, fremdulo veninta el alia urbo, tiam demandu senoblikve nur pri tio, kion oni notis pri tiu mateno sekvanta la tagon de la kondamno, en kiu mi parolis kun Sokrato. Tiajn demandojn mi estas preta respondi.

Antikritono: Bone. Diru do, Kritono, kiacele vi iris antaŭ mateniĝo en la prizonon de Sokrato, subaĉetinte la gardiston, por ke tiu vin enlasu?

Kritono: Mia celo — vi kalkulis, de kiom multe da jaroj — estas klara. Mi volis savi la vivon de Sokrato.

Antikritono: Kaj diru, kiamaniere vi volis ĝin savi?

Kritono: Vi mem povus tion scii! Vojon, eblon mi serĉis kaj trovis por lin rifuĝigi al Tesalio, al miaj gastamikoj, kiuj lin respektos kaj sekurigos kontraŭ ĝenoj de tesalianoj.

Antikritono: Do vi proponis vian helpon por fuĝo?

Kritono: Jes.

Antikritono: Vi respondis jese. Tiel do mi devas demandi ankaŭ tion, ĉu vi ĉeestis la juĝprocedon, kiam Sokrato diris sian apologion?

Kritono: Jes, mi ĉeestis.

Antikritono: Tiam vi devas memori, ke Sokrato ne emis foriri el la urbo, kvankam li povis supozi, ke la juĝistoj kontentus pri lia ekzilo, se ĝin li petus. Ĉu vi memoras?

Kritono: Jes, mi memoras.

Antikritono: Diru do, kio vin instigis, ke vi persvadadu fuĝi Sokraton, kiu eĉ kun la permeso de laŭleĝa decido ne estus ema forlasi la urbon. Kiel do li farus tion alivestite, kovrite per bestfeloj, priridigante tiamaniere sian maljunon? Kio vin kondukis, ho Kritono, pri kiu ni scias, ke vi estus unu el la garantiuloj de Sokrato, se oni kondamnus la senhavan Sokraton je monpuno?

Kritono: La proksimo de la morto, tiel oni spertas, ŝancelas la konstantemon.

Antikritono: Ĉu vi do kalkulis je la malkuraĝo de Sokrato?

Kritono: Mi ne nomus malkuraĝo nian instinkton enradikiĝintan.

Antikritono: Nek mi, certe, en aĝo de infano. Sed se vi aŭ mi perdus tiamaniere nian konstantemon, tio estus ja malkuraĝo: malforto, kiun klarigi kaj ekskuzadi estu for de mi. Ĉu vi ne rekonas, ke via supozo ofendis ĉi tiun viron pli ol 70-jaran, kiu preskaŭ neniam forlasis sian naskurbon, maksimume pro sia soldata devo?

Kritono: Eĉ se vi pravus, mi povas diri por mia ekskuzo, ke mi volis savi mian amikon de antaŭ la plenumo de maljusta juĝo.

Antikritono: Tio estas vera kaj servas por via laŭdo jam de post du mil tricent sepdek unu jaroj. Sed ĉu vi faris ĉion en la intereso de lia savo? Kaj ĉu vi faris ĉion en la intereso de la semmakule bona renomo de Sokrato?

Kritono: Jes. Mi volis lin eskapigi el la prizono.

Antikritono: En la intereso de lia savo vi vizitis lin, estas vere, sed vi devas rekoni, ke la rifuĝo ne estis

la vojo de Sokrato. Kion vi faris ankoraŭ?

Kritono: Kion alian mi povus fari, kiam ĉiu vorto de Sokrato pruvis antaŭ mi, ke pli bone estas elsuferi eĉ maljustan juĝon, ol rompi la leĝojn. Kaj tion ĉi mi devis agnoski.

Antikritono: Mi aŭdu, kiel Sokrato argumentis.

Kritono: Platono fidele priskribis nian interparolon. Vi konas ĝin. Aŭ, ĉu mi diru ĝin dekomence ĝisfine?

Antikritono: Vi povas tion fari, sed se vi ne volas, ĉar ni ambaŭ opinias ĝin konata, tiam citu, kion vi rigardas plej grava. Kio estas tio, kion Sokrato diris unuavice?

Kritono: „La ĝuste vivanta homo neniam rajtas agi, nek reagi malprave: eĉ se li suferas maljuston, li ne rajtas sin defendi per tio, ke li respondas per maljusta ago."

Antikritono: Ĉi tio estas laŭ la spirito de Sokrato; ni devas akcepti, ke Sokrato parolis tiel, kiel, laŭ nia scio, li ĉiam parolis. Ĉi tion do ni komprenas. Poste, kion li diris?

Kritono: »Se ni foriras de ĉi tie, ne konvinkinte la urbon pri ties ĝusteco, ĉu ni faras malbonon, kaj eĉ kontraŭ tiuj, kontraŭ kiuj malpleje decas, aŭ ne? Kaj ĉu ni persistas ĉe tiuj principoj, kiujn ni nomis justaj, aŭ ne?«

Antikritono: Tie ĉi mi ne komprenas, kontraŭ kiuj decus malpleje fari malbonon, kaj tiam, kontraŭ kiuj decus, ni diru, ne malpleje? Kion vi respondis al Sokrato?

Kritono: Laŭvorte jenon: „Mi ne scias respondi vian demandon, ĉar mi ne komprenas ĝin."

Antikritono: Tio estis respondo saĝa, inda al la kunulo de Sokrato. Sed kion Sokrato respondis?

Kritono: Li invokis la voĉon de la urb-komunumo, kiu povus diri, ke lia fuĝo estus provo pereigi ilin, la leĝojn kaj la tutan urbon. Poste li demandis: „Aŭ, ĉu ni diru al ili, ke la urbo faris kontraŭ ni maljuston kaj ne ĝuste metis sian juĝon? Ĉu tion ĉi ni diru? Aŭ kion?" „Je Zeŭso, ja certe ĉi tion", mi respondis al Sokrato.

Antikritono: Mi vin konsentas, Kritono.

Kritono: Sed Sokrato, por min konvinki, daŭrigis sian argumentadon. Li diris, kion la komunumo povus al li diri, tio estas, li diris, la eblajn argumentojn de la komunumo, laŭ kiuj li ŝuldas obeon al ĝi kiel al sia patro, sia mastro. Eĉ pli multe ol al patro, patrino; ĉar — la komunumo povus diri —, ol ĉiu alia praulo la patrio estas pli valora, kaj ankaŭ pli estiminda kaj sankta, kaj tial ni devas pli multe serĉi la favoron de la rankoranta patrio kaj flati al ĝi ol al la patro, kaj aŭ ĝin konvinki, aŭ fari, kion ajn ĝi ordonas, kaj trankvile toleri, se per ia sufero ĝi nin ŝarĝas, ankaŭ tiam, se ĝi nin batas, ankaŭ tiam, se ĝi nin katenas, ankaŭ tiam, se ĝi sendas nin en la batalon, por ke tie ni vundiĝu aŭ mortu. Ĉion ĉi ni devas fari, kaj ĉi tio estas la vero, sed uzadi perforton nek kontraŭ nia patrino, nek kontraŭ nia patro kaj eĉ pli malmulte kontraŭ nia patrio estas afero plaĉa al dio. Kion ni respondos je ĉi tio, ho Kritono? Ĉu la leĝoj diras veron aŭ ne?

Antikritono: Kion je tio vi respondis?

Kritono: Mi respondas: »Kiel mi vidas, ili diras veron«.

Antikritono: Mi ne estus tion vidinta.

Kritono: Nu, Sokrato argumentis ankoraŭ plu: La leĝo, li diris, estus povinta argumenti plu, jene: "... ni deklaras, ke tiu Atenano, kiu fariĝis plenrajta kaj vidas la kutimojn de la urbo kaj nin, leĝojn, rajtas, se ni ne plaĉas al li, laŭdezire preni siajn havojn kaj foriri, kien ajn li volas. Kaj el ni, leĝoj, eĉ ne unu baros al li la vojon, nek malpermesos, se iu tia volas foriri en iun kolonion, ĉar ni aŭ la urbo ne plaĉas al li aŭ li volas transloĝiĝi ien aliloken. Li povas iri, kien li volas kaj povas kunporti ankaŭ sian havaĵon. Sed kiu el vi restas tie ĉi, vidante, kiel ni faras la juĝojn, kaj kiel ankaŭ alimaniere ni direktas la urbon, pri tiu ni jam diras, ke per ago li konsentis pri tio, ke li faros ĉion, kion ajn ni al li ordonos, kaj se li ne obeos, tiam ni diros pri li, ke li faras trioblan maljuston: unue, ĉar li ne obeas nin, kvankam ni estas liaj gepatroj; due, ĉar ni estas ankaŭ liaj edukintoj; trie, ĉar post kiam li konsentis pri tio, ke li nin obeos, li ne obeas, kaj ankaŭ ne konvinkas nin pri tio, ke ion nebone ni faris, kvankam ni nur proponis kaj ne krude surŝarĝis lin per tio, ke li observu niajn ordonojn: ni lin lasis ja elekti inter du aferoj: aŭ li nin konvinku aŭ li obeu — kaj li faras neniun el la du."

Antikritono: Sokrato metas ĝustajn argumentojn sur la langon de la komunumo. Sed tiuj argumentoj parolas ja kontraŭ vi, kiu volis lin konduki sur malĝustan vojon, kiam vi proponis al li la vojon de la fuĝo.

Kritono: Tial mi iris al li en la prizonon, por ke mi savu lian vivon.

Antikritono: Ĉu Sokrato deziris tion? Ĉu li montris ian signon pri tio?

Kritono: Mi devas diri, ke ne.

Antikritono: Ĉu utilus al la renomo kaj justa karaktero de Sokrato, se li estus fuĝinta?

Kritono: Ni povis kompreni jam el la argumentado de Sokrato, ke ne.

Antikritono: Tiam ni povos eble diri, kio estus pli utila al la renomo de la urbo? Ĉu tio, se multe rezonanta malobeulo turpe fuĝas el la manoj de la leĝo, aŭ se iu — ĝuste Sokrato — suferas mortpunon sekve de maljusta juĝo? Kio estus pli utilinta al la urbo?

Kritono: Por la urbo estus pli utila, se Sokraton oni ne kondamnus.

Antikritono: Kaj, se oni lin jam kondamnis, kio estus pli utila al la urbo?

Kritono: Se la kondamnito observus mian konsilon.

Antikritono: Sekve, se Sokrato ne volis iri en ekzilon, kaj eĉ malpli fuĝi, per kio do li povis pli elmontri sian koleron kaj malestimon, ol ĝuste per la akcepto de la morto.

Kritono: Per la akcepto de la morto.

Antikritono: Tiel estas, jes ja. Sed vi, Kritono, estus ankoraŭ povinta havi unu argumenton, kies efikon vi ne povis ja fidi plene, sed kies eldiron vi devus provi tiam.

Kritono: Sed kia argumento do ĝi estus?

Antikritono: Jena argumento: memorigi Sokraton, ke la potenco ankoraŭ ne estas justo kaj ne ĉiam samsignifas ankaŭ kun la leĝo. Vi estus povinta citi tiujn vortojn de lia Apologio, kiam li diris: „Al neniu mi kutimas cedi pro mortotimo kontraŭ la vero kaj, ĉar mi ne cedas, mi facile povas perei." Por pruvi ĉi tion, Sokrato citas ne vortojn, sed agojn. Kiam, nome, estiĝis la oligarkio, unufoje oni sendis voki Sokraton inter kvinopo en la rondan konstruaĵon de tiu trideko, kaj ordonis... sed plej bone estos citi la vortojn de Sokrato: „ke ni alportu el Salamiso la Salamisan León, por ke li estu ekzekutita. Ankaŭ al multaj aliaj ili donis plurajn tiajn komisiojn, ĉar ili klopodis fari kiel eble plej multajn homojn siaj komplicoj. Kaj ankaŭ tiam ne per vortoj sed per ago mi pruvis, ke pri la morto, se ne estus vulgare tiel paroli: mi zorgas ne pli ol pri putra pajlo, sed ke nenion malbonan mi faru, pri tio mi zorgas tiom pli multe. Tiu regado, kiel ajn potenca ĝi



Filino de Szentendre — Desegnaĵo de Éva Jóba

estis, ne timigis min tiom, ke mi faru maljuston, sed, kiam ni elpaŝis el la konstruaĵo, mi disiĝis de ili kaj hejmeniris kaj la ceteraj kvar iris al Salamiso kaj alportis Leonon. Kaj mi eble eĉ estus mortinta pro tio, se tiu regado subite ne falus."

Kritono: Mi ne komprenas, kiel min helpus atingi mian celon, se mi mencius la aferojn okazintajn tempe de la oligarkoj.

Antikritono: Tamen, vi devus tion kompreni, ĉar tie, tiam, antaŭ la juĝantoj, Sokrato ja eldiris, ke oni devas rifuzi la maljustajn ordonojn de la regantoj. Kaj se oni devas rifuzi la maljustan ordonon, tiam ankaŭ la falsan juĝon ne licas nomi rajta nek leĝa, kaj ni agas maljuste, se ni submetas nin al ia ajn falsa juĝo.

Kritono: Ĉu vi asertas, ke tia argumento instigus Sokraton fuĝi?

Antikritono: Mi ne asertas tion.

Kritono: Pro kio do vi riproĉas min krom tio, ke tiumatene mi ne eldiris ĉi tiun argumenton?

Antikritono: Pro tio mi riproĉas vin, ke vi eĉ ne provis tion, krome, ke vi ne estis sincera.

Kritono: Do tamen vi metas kontraŭ mi akuzon de logo en reton?

Antikritono: Ne. La fuĝon vi estus volonte sukcesiginta, sed sincera tamen vi ne estis. Vi devus tiam eldiri malkaŝe, ke vi iris antaŭ mateniĝo en la prizonon eĉ ne en la intereso de Sokrato, sed en la intereso de la urbo, de la komunumo.

Kritono: Se mi bone pripensas, mi devas diri, ke ankaŭ ĉi tio estas vero.

Antikritono: Sed ĉi-okaze, estus pli bone tiam eldiri malkaŝe ankaŭ ĉi tion kaj peti petege Sokraton, ke li moderigu sian malestimon kontraŭ leĝoj obeemaj ankaŭ en falsaj manoj, kaj li trovu ian eblon preventi la neripareblan. Por la urbo, por la leĝoj vi estus devinta peti indulgon.

Kritono: Li ne indulgis. Li juĝis per sia morto.

Antikritono: Sed vi, Kritono, volis mildigi ĉi lian duran juĝon, kiam la vortojn de Sokrato vi transdonis al la sekvaj jarmiloj tiamaniere, kvazaŭ li, pretekste de la estimo de la leĝoj, konfesus bona kaj sekvinda la akcepton de la falsaj juĝoj.

Kritono: Pri la morto de Sokrato mi estas ĉiel senkulpa.

Antikritono: Ne defendu vin kontraŭ tio, per kio mi vin ne akuzas — cetere, mi ne estas ja via juĝanto.

Kritono: Kio do vi estas al mi kaj kio vi estas, vi, kruela Antikritono?

Antikritono: Nur la serĉanto de la vero, kaj kiel tia mi asertas — kaj ankaŭ pruvis —, ke vi helpis malpligrandigi Sokraton, montrante lin tia homo, kiu taksas pli alte la leĝon ol la veron. Kaj via tiama aktivado — en viro pli malforta ol Sokrato — estus vekinta dubon pri la senchaveco de la bona morto, kvankam li mortis por tio, ke li pruvu per sia morto la vivon de la vero. (1972)

Tr. K. *KALOCSAY*

József Lengyel

Sternekund kaj Reinekund

Ĉu estis (aŭ ĉu estos) mirige bela lando; tiel granda, ke ĝi ampleksis la tutan teron, sekve tute ne povis ekzisti malamikaj landoj, nek ekmilitantaj reĝoj, nek hororigaj armiloj. La homoj vivis tiel, kiel decas vivi al bonaj gefratoj, kiuj inter si dividas ĉion, kaj ĝoje helpas unu la alian en la laboro.

En tiu plezuriga lando ĉio estis nuraj ĝardenoj kaj vitromuraj domoj; ĉiufoje, se iu volis ĝojiĝi, li devis nur rigardi internen tra la vitraj muroj de la domoj. Vidante, kiel bele kaj bone vivas la homoj tie, la koro de la rigardanto ankoraŭ pli sereniĝis. Potencaj kaj fortaj estis la homoj, ĉar ĉiu sciis kion fari, tiel ke ili bezonis nek ordonantojn, nek soldatojn. Ili laboris en konkordo, elcerbumis miraklajn maŝinojn, konstruis belegajn bibliotekojn kaj, kompreneble, ĉiuj homoj veturis per tia aviadilo, ke dum kelkaj minutoj ili povis alveni de unu loko al la alia de la mondo, por renkonti konatojn. Apenaŭ la vojaĝanto aranĝis siajn aferojn, tuj li troviĝis hejme, ĝustatempe por vespermanĝi.

La viro, pri kiu en nia rakonto temas, estis esploristo de vetero, observisto de astroj: laŭnome Sternekund. Tiu Sternekund kaj aliaj scienculoj elspertis, iom post iom, ĉiun gradon kaj fazon de la vetero, tiel ke ili kapablis precize ĝin antaŭdiri. Cetere, ili ellernis ankaŭ la metodojn, per kiuj laŭplaĉe eblas formi la veteron. Kiam la scienculoj jam kapablis tion fari, ili kunsidis por interkonsili: kiam kaj kiaspeca vetero estus la plej konvena, kaj laŭ tio ili agis. Kaj tute ne okazis tiutempe, ke la ekskursantoj malsekiĝus, dum la maizkampoj sekiĝus, sed pluvis tie kaj tiam, kie kaj kiam estis necese. La glitkurejoj ne degelis kristnaskotempe kaj novjare, kaj tute ne frostis dum la florado de l'abrikotarboj.

En bela ĝardeno staris la vitromura domo, kie Sternekund vivadis, legadis, kaj fininte la laboron, dormadis. Post kiam li ellitiĝis, baniĝis en la kristala akvo de basenoj el marmoro, kiuj troviĝis en la ĝardenoj; li naĝkonkursis kun siaj kamaradoj, junuloj kaj maljunuloj. Poste ili iris kune tagmanĝi. Post tagmanĝo li freŝe laboris en la granda, komuna legomĝardeno; vespere li esploradis la astrojn per grandioza teleskopo, staranta en alta turo, kaj ĉiutage enskribis en la grandan libron siajn spertojn. Tiamaniere li riĉigis la plej gravan komunan trezoron de la homaro, la sciencon, originon de ĉio bona.

Iun vesperon, post kiam al li venis okazo enskribi en la libron speciale utilajn spertojn kaj precipe gravajn notojn, la bravulo Sternekund hejmeniris, sidiĝis sur benko kaj enpensiĝis.

»Mi estas ege bonŝanca homo — li pensis —, ke mi povas tiel bone servi miajn homfratojn per la scienco, kaj mia tuta vivo estas tiel bela. Labori en ĝardeno, plantadi, pioĉadi: kia ĝojo. Ĉu estas bone — meditis —, ke neniel sur mi pezas, eĉ kontraŭe plezurigas min la laboro? Nu jes, nature, tio ne estas malbona! Tamen, ĉu ĉies laboro estas tiom delica?« — Kaj tuj li ekmemoris sian amikon kaj lernejkamaradon, Reinekund-on, kiu pasigis la tempon en granda oficejo kalkulante, kiel grandan parcelon oni devas plensemi per tritiko, kaj kiel grandan per karoto, por ke ĉiu povu manĝi tiom, kiom li volas. Kaj ĉiun duan tagon li purigadis la urbajn kanalojn. (Ĉar tiutempe, en tiu urbo, ĉiuj homoj havis du okupiĝojn. Sternekund, kiel dirite, laboris en legomĝardeno kaj samtempe observis la astrojn.)

»Kial Reinekund devas ankaŭ purigi kanalojn — meditadis Sternekund —, kiam ankaŭ en la sciencoj li ne povas trovi ĝojon?«

Sternekund, kvankam li estis astroobservisto, klare vidis: kvankam oni faras la kanalpurigadon per maŝino, ĝi tamen estas malpurega laboro, kompare kun tiuj aliaj tre belaj kaj puraj; cetere, regis kelkfoje malbonodoro, dum la riparaj laboroj.

Kiam Sternekund pense alvenis al ĉi tiu punkto, li tuj leviĝis de sur la benko, aliris al Reinekund, kaj jene lin alparolis:

— Mia kara frato, mia bona lernejkamarado! Ambaŭ miaj okupiĝoj estas pli delicaj ol la viaj. Mi petas vin, ni ŝanĝu! Estu via la ĝardena laboro, al mi restu la kanalpurigado. Tiel vi ĝojigus min.

— Estas dirite de vi — respondis Reinekund. — Mi konas vin, do mi scias, ke tiel farante vi ĝojiĝos; pro tia mi konsentas. Kvankam ankaŭ ĝis nun mi vivis kontente, ja mi ĉiam sciis, ke ankaŭ mia laboro apartenas al la komuna laboro de l'homaro.

Tiom, aŭ eĉ ne tiom ili parolis pri la afero. Reinekund fariĝis ĝardenisto, Sternekund kanalpurigisto.

Kompreneble, la onidiro disvastigis la okazintaĵon; ne ĉar Sternekund komunikis ĝin al la kanalpurigistoj, sed ĉar Reinekund ĝin rakontis al la ĝardenistoj. Kaj ĉiuj iĝis feliĉaj pro tio, ke ili aŭdis tian belan famon pri unu el la tre honorataj scienculoj de la urbo. Kiam Sternekund revenis hejmen el la laboro, li estis jam atendata de infanoj kiuj zorgeme purigis liajn manojn en la akvo de la marmorputoj; kaj li rekompencis la infanojn, rakontante al ili tre belajn fabelojn.

Sed troviĝis aliaj urboj en la granda lando, en kiuj ankoraŭ ekzistis aparte scienculoj, aparte laboristoj. La malnova-antikva mondo, en kiu estis riĉuloj kaj malriĉuloj, lasis nur tiun postsignon.

Kiam en tiujn urbojn alvenis la famo pri la ago de l'bravulo Sternekund, la tieaj scienculoj aliradis, pilgrimadis al la kanalpurigistoj, ĉar ili komprenis per sia granda intelekto, ke estas bele servi la fratojn per peza laboro, kia ajn ĝi estas. Do estis decidite, ke ĉiu havu du okupiĝojn, kiel en la urbo de Sternekund kaj Reinekund. Ambaŭ laboroj servu la komunan bonon, fruktuzante en unu la menson, en la alia la fizikajn fortojn; kaj jam infanaĝe oni ellernu ambaŭ profesiojn.

Tiel vivis plu la homoj: pensante ĉiuj, cerbumante ĉiuj nur pri tio, kiel plibeligi, kiel fari ankoraŭ pli vera la vivon de l'frateca homaro.

Trad.: Zsuzsa *Varga-Haszonits*

József Lengyel

Respondo al cirkuldemando

La respondoj, konfesoj estas malfacilaj por mi, precipe, ĉar mi eĉ ne scias, kia estas la etoso de mia laborejo, ĉu ĝenerale ĝi havas etoson? Kvankam la ĉeesto de karaj objektoj min ĝojigas, tamen mi alkutimiĝis al ilia perdo, tiel same kaj eĉ pli, ol al la perdo de homoj.

Do kion mi respondu je la cirkuldemando? Eble mi parolu pri mia favorata skribotablo? Sed mi ne povas scii, kiu estas mia favorata skribotablo, ĉar mi havis sume nur unu. Tiun, kiun mi havas ankaŭ nun — ĝis mia sesdekjara aĝo mi havis nenian regulan, propran skribotablon, nek favoratan, nek malfavoratan.

Ĉu mia biblioteko? Mi forlasis unu en Budapeŝto en 1919, alian en Vieno, trian en Berlino, la kvaran en Moskvo. Kiam mi forlasis iun landon, mi forlasis tie ankaŭ miajn librojn. Sed ĉi tiun kvinan, la nunan, la Budapeŝtan mi dezirus jam konservi. Nome mi volus, ke ĉi tie mi mortu, ĉi tie, ĉe Danubo; dezirante havi bonajn manojn fermi miajn okulojn...

Ĉu tio estis bona, ke mi ne havis skribotablon ĝis mia sesdeka jaro? Eble tio estis ankaŭ bona, ankaŭ malkonvena. Ke mi nun havas, tio estas certe bona. Miajn iamajn librojn certe mi estus povinta kunporti el antaŭa lando en alian, se mi zorgus pri ili. Sed mi ne zorgis pri ili. Pli ĝuste... ankaŭ mia malzorgemo ne estas „ekskluziva". Mi aĉetis en 1919 vortaron de Ballagi en Budapeŝto, kiu fidele akompanis min ĉien. Ĝi kunvenis ankaŭ hejmen kun mi; en 1957 ĝi estis jam tiel foruzita pro la legado, ke mi devis bindigi ĝin refoje. Ĉu mi ŝatas tiun libron? Ne, mi nur uzas ĝin. Nun mi havas ankaŭ tiun de Czuczor, tiun mi preferas. La novan „Értelmező", (senceksplika) mi ŝatas malpli, prefere la lingvohistorian. Ĉar tiu estas pli bona.

El miaj manuskriptoj perdiĝis relative malmultaj. Mi havas ankoraŭ tiun junaĝan romaneton, sur kies unua paĝo legeblas la propramana skribo de Lajos Kassák: „Du kolumnoj". Ĝi estis jam en la presejo, kiam mi repetis ĝin, pro mia rompo kun la revuo de Kassák, laŭ iniciato de Komját. Ankaŭ miaj aliaj manuskriptoj estas ĉe mi, kiujn zorgemaj, karaj manoj konservis dum mia foresto. Sed tiuj estas iom primitivaj, mi juĝas ilin ne taŭgaj por publikigo. Ankaŭ ne tiun, kiun Kassák sendis en presejon. Mi domaĝas forĵeti ilin — ili estas memoraĵoj.

Mi vivas, kvankam mia laborkapablo ne estas granda, tamen ne malpliiĝis je nulo. Mi havas loĝejon kvardekdu kvadratmetrojn ampleksan, oni povas diri ĝin komforta; mi pasigas ĉirkaŭe la duonon de la jaro en bela vilaĝo. Mi havas belajn librojn kiel mi diris, skribotablon; krome kelkajn bildojn kaj lignostatuojn. La kolektado de lignoskulptaĵoj estas mia malnova, sed bremsita pasio. Ja, kiam eksterlanda verkisto demandis inter aliaj ankaŭ tion, kio estas mia hobio, mi respondis: „Kolektado de ŝtonetoj, glatigitaj per la drivo de akvoj". Kaj tio ankaŭ veras. Mi ŝatas la kolorajn ŝtonetojn el Nanking kaj tiujn trovitajn borde de la hungaraj riveroj. Aliflanke mi ne havas juvelŝtonojn, or-objektojn — mi havas libron: ankaŭ kelkajn Elzevirojn.

Sed ĉio kion mi rakontas ĉi tie, estas konsterna per tio, ke mi vivas; ja troviĝis tiom da eblaĵoj, ke mi ne vivu. Apenaŭ mi povas imagi kalkulmaŝinon, kiu estus povinta konstati mian futuron laŭ la estantaj faktoj antaŭ sesdek, kvindek aŭ nur dudek jaroj. Kiom en la vivo estas la neceseco sekve de la historiaj situacioj? Kion la genoj plenumas kaj decidas? Kio kaj kiom

Sur la strato



En la korto de sia apudbalatona somerdomo.

...kaj interne de la somerdomo

estas la hazardo? Hazardo, kiu aliigas la necesecon, kiam ankaŭ inter la hazardoj troviĝas „hazardoj", kiuj similas al la antaŭdestinismo aŭ al la vulgarigita historia neceseco. Tiaj hazardoj, kies certa reguleco estas elkalkulebla. Sed ekzitas ankaŭ alispecaj hazardoj, kiuj okazas kvazaŭ vere hazarde, sed poste ili subite ordiĝas senindulge en vicon kaj laŭvice kaŭzas la sinsekvon de la okazintaĵoj, ĝis eble ia fremdeca neceseco — aŭ ĝuste plua hazardo — dumtempe intervenas, kiu eble direktas al alia vojo la vicon, ŝajnantan ĝis tiam kvazaŭ laŭnecesa.

Malfacile estas respondi, sed kiel ni vidas, ankaŭ demandi ne estas facile. Aŭ ni kontentiĝu per tio, dirante: la fakto de la vivo pruvas la vivon kaj la vivovolo pruvas, ke valoras vivi.

Ĉiu leganto mem devas apliki la demando- aŭ krisignon.

El tio, ke laŭpersone mi vivas, aŭ ne vivas, la filozofoj pruvos nek la necesecon, nek la hazardon. Laŭ anekdoto iu alvokis Hegel jene: „Pruvu ke la plumo, kiu kuŝas apud la inkujo, troviĝas sur tiu loko, kie ĝi estas, laŭ la leĝo de la racieco. La respondo de Hegel estis: „Mi tuj faros tion, kiam mi, krom ĉi tio, ne havos pli gravan aferon". Nu, en mia kazo la filozofo povas respondi ankaŭ tiel same. Ja ne verkisto li estus.

Kiu neus, ke en la vivo de la unuopa homo, aŭ en tiu de pli grandaj homgrupoj kaj socioj, multaj aferoj aperas laŭnecese? Tamen ekzistas hazardoj, kiuj estas tre pripensigaj. Estas verŝajne, ke oni estus malkovrinta Amerikon pro la tiama stato de la ekonomio, geografio, politiko, navigacio, se la ŝipoj de Kolombus detruiĝus, antaŭ ol atingi la celon. Ankaŭ tio ŝajnas certa, ke, kiam la scienco atingis la konforman nivelon, Bolyai, Gauss kaj Lobaĉevszkij povis malkovri preskaŭ samtempe la ne-eŭklidan geometrion. Tio estas speciala kazo, tamen malpli komplika, ol la kazo verki grandan romanon. Ĉar kiu estus verkinta Don Quijote, se ĉe Lepanto saracena glavo — aŭ ĉu ĝi estis kanonkuglo? — hazarde detranĉas ne la brakon, sed la kapon de Miguel de Cervantes? Nenio, vere nenia signo estas sub la ĉielo, ke alia verkisto estus skribinta kaj tiel skribinta Don Quijote, kiel ĝi feliĉe estis skribita. Se la bonŝanco ne indulgas la vivon de Cervantes per la perdo de unu brako en la mara batalo ĉe Lepanto, certe la situacio de la hispana literaturo, sed ankaŭ tiu de la mondliteraturo montriĝus tute alia.

Bedaŭrinde, ekzistas ne nur hazardoj nomeblaj feliĉaj, sed ekzistas ankaŭ malfeliĉaj hazardoj. Kiu scias, kiom da grandiozaj homoj detruiĝis tiel, ke ni eĉ ne scias ilian nomon.

Inter miaj libroj kaj bildoj, ŝtonoj kaj lignoskulptaĵoj tiu penso venas — ankaŭ ne malofte — en mian kapon.

Anstataŭ respondi— mi demandas...

Trad. István *László*

Letero al la parlamentanoj *

Estimataj Kamaradoj Deputitoj!

Ni intencas akiri vian simpation kaj subtenon por afero, kiun pensuloj sentantaj respondecon pri la homaro klasigis ekde jarcentoj, kaj en nia epoko eĉ pli kaj pli, inter la plej gravajn zorgojn de la popoloj. Mi deziras vin orienti pri la turmentoj de la multlingveco, pri la granda malŝparo de intelektaj kaj materialaj fortoj sekve de ĝi kaj pri la eblaj solvoj de ĉi tiu problemo, por veki vian interesiĝon kaj helpemon.

Ni scias, ke ekzistas pli urĝaj demandoj de la homaro ol la ĉesigo de la Babela lingvokaoso, tamen, nia firma konvinkiĝo estas, ke tiu kaoso pli kaj pli malfaciligas la interrilatojn en la politiko, sciencoj, tekniko, arto, sporto, kaj inter la homoj nun jam centmilionope vojaĝantaj, kaj ke la ĝisnunaj metodoj kaj rimedoj por tion solvi estas jam malsufiĉaj, pli kaj pli, ofte plene netaŭgaj; sekve la ekzamenado de la demando ne estas longe prokrastebla.

La pli kaj pli granda akceleriĝo, la galopo karakterizas la ritmon de nia epoko, tiun de la lastaj tridek jaroj. Nun iu ajn punkto de la tero atingeblas en kelkaj horoj, la televido, radio, telefono en la minuto de la okaziĝo verŝegas en nian hejmon neakcepteble, neprilaboreble multajn eventojn, informojn el la mondo. Sur nia tero ĉiuminute aperas unu libro. La nombro de fakaj revuoj jam antaŭ 20 jaroj estis 100 000, kaj ĉe la jarmil-turno, laŭ la antaŭsignoj, ili plimultiĝos ĝis miliono. Sed kiel multaj kaj kiel povos kompreni, sekve utiligi tiom da informoj manke de unu kaj sama komunik-rimedo, manke de pera lingvo? Laŭ eksperimentantaj scienculoj jam ankaŭ nun estas pli facile ion eltrovi, ol elmini informon pri anticipa eltrovaĵo el la multlingvaj papermontoj. Eĉ tiuj ne prosperas pri tio, kiuj principe akceptas la anglan kiel sciencan-teknikan lingvon. Ĵurnalo komunikas: „Vere, ke ĉ. 40% de la teknikascienca literaturo estas anglalingva, sed du trionoj de la teknikfakuloj ne scias flue legi alilingvan tekston fakan. Ankoraŭ pli granda kvoto de la anglosaksaj fakuloj ne scias legi alilingvan fakan tekston . . ." Simile: la diversaj internaciaj konferencoj, kongresoj, sciencaj, teknikaj, artaj aŭ diplomatiaj, politikaj konsiliĝoj povas labori nur kun malpliiĝinta efikeco, ĉar mankas la komuna lingvo alproprigita de ĉiuj partoprenantoj same bone, sur patrolingva nivelo. Manke de tio, la pli-malpli altgrada parolkapablo en unu aŭ du lingvoj, aŭ la plena translasiĝo al la interpretistoj tute ne estas konvenaj por rapida, serioza opiniośanĝo kun ekskludo de miskomprenoj.

Ke ni ne troigas, nomante la multlingvecon unu el la plej grandaj plagoj postulantaj kuracon, tion parade pruvas la figuro de interpretisto, kiu avancis je rolulo nemankebla. Ĉie li staras kiel sennoma tria persono malantaŭ la landgviduloj aŭ en la plej altnivelaj konsiliĝoj, decidante pri la sorto de la mondo. Jen li sidas, apud la preleganto, jen, nevideble, en interpretista ĉelo, sed sen li eĉ la plej grava simpozio paraliziĝus. Kaj jam nun ne ekzistas sufiĉe da sinkronaj fakinterpretistoj, kiel ankaŭ ĝenerale sentiĝas manko je interpretistoj kaj tradukistoj.

Kaj se politikistoj, diplomatoj, scienculoj, artistoj, vojaĝantaj komercantoj kaj aliaj tiel pene luktas kontraŭ la lingvaj obstakloj, kiel estus atendeble, ke laboristoj, kamparanoj, homoj de malpli granda instruiteco venku super la Babela plago dum siaj vojaĝoj, ĉe siaj personaj renkontiĝoj? Tamen, el tiaj konsistas la plimulto de la 250 milionoj da vojaĝantoj-turistoj, kaj apud ili ne staras interpretisto, kaj tiuj kelkaj dekoj da vortoj kaj parolturnoj de iu fremda lingvo, kiuj ankoraŭ konserviĝis el la lernejaj jaroj, ofte ne sufiĉas eĉ por sciigi pri la irota, vojo, des malpli por interŝanĝi ideojn kun alipopolaj homoj inde al la homo de la socia-scienca-teknika revolucio, atomenergío kaj kosmoveturo. Kiom da milionoj da humiliĝoj, sensukcesaj iniciatoj, reciproke deziritaj sed nerealigeblaj amikecoj, ĉiutage, pro la lingva senkompreneco!

La popoloj do senprokraste bezonas krom siaj naciaj lingvoj unu internacian peran lingvon. Sed kiu estu tiu lingvo? — Demando tiel same malnova kiel la rekono de la neceso de l'solvo. Esti tia lingvo dua aspiras plej tenace kaj sukcese, krom la franca, la angla lingvo. Kaj troviĝas multaj homoj — scienculoj, artistoj, mezuloj — laŭ kiuj sur multaj kampoj de nia vivo jam nun la angla estas la „internacia lingvo". Sed la konantoj de la demando scias, ke tio ne estas vera, kaj ke el multaj motivoj oni povas rigardi vanaj la esperojn de la anglalingva imperiismo: tion ke la reprezentantoj de la popoloj, kiam oni decidos en UN pri ĉi tiu demando, metus la anglan, aŭ la lingvon de iu ajn popolo, antaŭ sian propran gepatran lingvon. Iu ajn nacia lingvo, nome, sekve de sia naturo, perus privilegie la kulturon, ideologion, politikajn-potencajn strebadojn de la respektiva lando: la popoloj gardantaj pri sia sendependeco, suvereneco, pri la pureco kaj pluvivo de sia gepatra lingvo ne povas doni tian privilegion al iu ajn alia nacia lingvo. „La nacia programo de la laborista demokratio estas: nenian privilegion al iu ajn nacio, al iu ajn lingvo — skribis *Lenin*. — Rekoni

---

* *Aperis en Eszperantó Magazin 1975/10., elhungarigis. SZMR.*

la nacian kaj lingvan egalrajtecon estas grave por la marksistoj ne nur tial, ĉar ili estas la plej konsekvencaj demokratoj. La interesoj de la proleta solidareco, la interesoj de la kamarada unueco en la klasbatalo fare de la laboristoj postulas la plej plenan egalrajtecon de la nacioj, por ke inter ili ĉesu eĉ la plej malgranda malkonfido, fremdeco, suspekto kaj malamikado. Kaj la nocio de la plena egalrajteco havas en si ankaŭ la neon de ĉia privilegio de ĉiu ajn lingvo . . ."

Ekde *Descartes*, vivinta en la unua duono de la 17-a jarcento, scienculoj kaj laikoj pretigis multajn centojn da projektoj de artefarita lingvo (ilian nombron oni taksas je 500—1000), sed el tiuj sole la lingvo Esperanto, ellaborita de la pola Zamenhof, eltenis la provon de la praktiko. La lingvo, publikigita en 1887, havas nun organizaĵon, Universalan Asocion, kiu enretas la tutan terglobon; ekde 1905 ĉiujare oni aranĝas la mondkongreson de la lingvo-adeptoj. La lingvon Esperanto tiaj famuloj juĝis plej taŭga solvo, rapide kaj facile ellernebla bela lingvo, kiel *Barbusse, Romain Rolland, Gorkij, Lev Tolstoj, Jean Jaurés, Einstein, Frigyes Karinthy*. En 1961 *János Kádár*, unua sekretario de HSLP salutis nian Hungara Vivo, tiam ekirintan, per jenaj vortoj: „La kreinto de la lingvo Esperanto volis servi la pli bonan interkomprenon de la popoloj per sia kreaĵo. Liaj sekvantoj kaj disĉiploj — se ili vere volas servi la noblan aferon —, havas la taskon deklari ankoraŭ pli decide kaj helpi per siaj agoj la triumfiĝon de la noblaj ideoj de la paca kunekzistado. Sukceson al iliaj klopodoj!"

Nun milionoj da homoj parolas tiun lingvon; ĝia literaturo empleksas ĉ. 2000 originalajn kaj 30 000 tradukitajn volumojn; aperadas 100 gazetoj E-lingvaj; la UNESKO en sia asembleo en Montevideo (1954) akceptis UEA inter siajn membro-organizaĵojn, rekonante la kulturajn valorojn de la lingvo kaj de ties movado. Oni instruas fakultative la lingvon jam nun en sennombraj lernejoj de multaj landoj, kaj en pluraj universitatoj jam oni edukas instruistojn de E-o. Ĉi-rilate ni iras antaŭe, ĉar en la Scienca Universitato Loránd Eötvös en Budapeŝto funkcias jam la dekan jaron E-a fako, kaj en la pedagogiaj alternejoj en Esztergom, Szombathely, Pécs kaj Sárospatak jam de jaroj oni edukas E-ajn lingvo-instruistojn. En la Scienca Universitato Loránd Eötvös nun estas projektata-preparata, kadre de la dekjara jubileo de la E-a fako internacia konferenco de en- kaj eksterlandaj lingvistoj pri la multlingveco kaj ties sekvoj; tiu konferenco estos la unua en la mondo.

Esperanto ne apartenas al unu popolo, sed estas ĉies havaĵo; ĝi ne endanĝerigas aliajn lingvojn, ĉar ĝi ne deziras ilin anstataŭi, sed ekzisti apud ili kiel pera lingvo, kvazaŭ dua gepatra lingvo de la homaro. Ĝi povus efektivigi la malnovan revon, ke ĉiu povu interkompreniĝi kun siaj hom-kunuloj vivantaj en ĉiu ajn regiono de la mondo. Ĉi tiu profunde humanisma kaj progresiva celo garantias la neŭtralecon de la lingvo, kion ni povas aserti pri neniu nacia lingvo.

En nia jarcento en multaj internaciaj organizaĵoj kaj en pluraj parlamentoj oni proponis pridiskuti la demandon kaj akcepti E-on kiel konvencian internacian lingvon. Numero de „Eszperantó Magazin" (1975/5) konigis la paŝojn de la hungaraj parlamentanoj favore al Esperanto; la numero 1975/6 publikigis resumon pri eksterlandaj iniciatoj (ambaŭ numeroj estas senditaj al vi aldone). Kiom la temo maturiĝas por komuna pridiskuto, tion montras ankaŭ la fakto, ke en la angla parlamento antaŭ jaroj formiĝis „Grupo de Anglaj Parlamentanoj por Esperanto" kun 46 anoj, kaj ke plej lastatempe ankaŭ en la franca parlamento 105 deputitoj proponis leĝon pri la instruado de Esperanto; pri ĉi tio vi povas legi raporton en nia nuna numero. La Itala Socialdemokrata Partio proponis en 1974 al la partioj de la Socialista Internacio, ke ili akceptu Esperanton kiel internacian laborlingvon. *Sándor Gáspár*, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de Hungaraj Sindikatoj tiel same faris altnivelan deklaron en la intereso de l' solvo de la lingva mondproblemo; li trovis dezirinda la uzon de E-o laborlingve en internaciaj sindikataj konsiliĝoj. Lian deklaron ofte kaj grandaprobe citadis la E-a gazetaro, kaj el ĝi transprene ankaŭ gazetoj nacilingvaj.

Sennombraj signoj avizas, ke alvenis la tempo, kiam oni devas esplori la demandon sur la plej altaj forumoj de la unuopaj landoj kaj naciaj federacioj. Por la skribo de nia letero nin kuraĝigis ke, laŭ nia opinio, la sociaj rezultoj kaj politika-kultura atmosfero de nia patrio, krome la internacie rekonitaj sukcesoj de la Hungarlanda Esperanto-movado estas eble la plej konvena kadro por tio, ke ĝuste la hungaraj parlamentanoj faru nun la necesan paŝon — en interkonsento kun la socialismaj kaj aliaj progresemaj landoj — por metigi la demandon sur la tagordon en UN.

Al via laboro ni deziras bonan sanon, multajn sukcesojn!

Géza Bárczi
akademiano
honora prezidanto de HEA

Mihály Gergely
verkisto

Mór Korach
akademiano
honora prezidanto de HEA

Imre Kutas
ĉefsekretario de HEA

András Sugár
ĉefkunlaboranto de Hungara Televido

(Aperis en Eszperantó Magazin 1975/10, elhungarigis SZMR)

Paseo nuntempo futuro

Kálmán Kalocsay fariĝis 84-jara

Ĉe datreveno estas ĝenerala kutimo iom retrorigardi por fari resumon pri la vojo irita.

Ĉi-okaze nia jubileanto volonte rakontis al siaj vizitantoj pri iom pli fruaj jaroj de Esperanto. Li longe memoris pri Literatura Mondo, respondis la demandojn de la pli juna generacio.

La ĉeestantojn tute ravis ne nur la senpera, familieca parolmaniero de Kalocsay, sed ĉefe: lia rilatiĝo al la forpasintaj tempoj. Li rakontis sen nostalgio, sen heroigo pri la junaj jaroj, pri la iamaj fortostreĉoj, tute objektive — eĉ iom ironie — li pritraktis la tiamajn stumblojn kaj kvazaŭ revivigis kelkajn eminentulojn kaj aliajn, iom strangajn figurojn de la E-movado.

Antaŭ kelkaj jaroj en la postparolo de la esperantigita Tempesto de Shakespeare la interpretisto Kalocsay skribis jene: „... ĉar ĉi tiu estas probablege mia lasta traduko el Shakespeare — kiel ajn malfacile, se ne diri dolore, estas forŝiriĝi el la ŝekspira mondo —, mi faros ankoraŭ kelkajn rimarkojn kvazaŭ testamente."

El tiuj vortoj kelkaj legantoj konkludis, ke li intencas entute demeti la liuton. Feliĉe ne temas pri tio. Li ne revadas pri la forfluginta paseo, sed dinamike agadas ankaŭ en la hodiaŭo. Ĝuste nuntempe aperos nova verko kun la nomo de Kalocsay. Li estas kunaŭtoro de tiu frazeologia kolektaĵo, kiu entenas 6 mil esprimojn hungarajn-esperantajn.

Kaj ĉu la futuro?

La sekvonta „kvinjara plano" estas jam prilaborita. Eble li pardonos, ke ĉi-okaze mi elbabilas ion ĝis nun ne publikigitan: de duonjaro li okupiĝas pri verkado de legolibro, kiu servos lingvan prefektiĝadon de esperantistoj.

En lia naskiĝtago elkore ni deziras, ke nia Kálmán Kalocsay plu laboru kiel ĝis nun por nia ĝojo, por bono de Esperanto.

A. CS.

Meditante pri pasintaj tempoj (L. Tárkony, K. Kalocsay kaj L. Kökény)

Konversacio kun András Sugár

HUMPHREY TONKIN

REĜO LEAR KAJ LA UNIVERSALECO DE SHAKESPEARE

Internacia Somera Universitato, Londono 1971

En sia admirinda postparolo al *Reĝo Lear* (Rotterdam, 1966), Kálmán Kalocsay, eble nia plej brila tradukanto de Shakespeare, memorigas nin, ke la sceneja historio de la majstroverko estis iom eksterordinara. Dum longa parto de tiu historio, la dramo prezentiĝis sur la scenejo nur en adaptita formo, kutime kun »feliĉa« fino anstataŭ la originala tragika, kaj kun diversaj aliaj mispoluroj kaj delikatigoj. La ĉefaj kritikoj kontraŭ la dramo en ĝia pura formo estis aŭ, ke ĝi prezentas tro nude la plej profundajn sentojn de la homa spirito, aŭ, ke ĝi estas esence neprobabla kaj nekredebla. Ofte la du kritikoj kunas en la sama traktaĵo. La eseisto Charles Lamb, ekzemple, trovis la elementan karakteron de la dramo tro korŝira kaj tro ekstrema por adekvata prezento; kaj eĉ en legado tro facile ni bildigas al ni, laŭ Lamb, »maljunulon ŝanceliĝantan... kun apogbastono, eldomigitan de la filino dum pluva nokto.«

La fakto ke tiuj ĉi bastardigoj de *Reĝo Lear,* aŭ tiuj kritikoj pri ĝi, dominis ekde la adapto far Nahum Tate fine de la 17-a jarcento ĝis eĉ la brila kritikisto de Shakespeare, Bradley, fine de la 19-a, eble rekte rilatas al certaj bazaj nocioj pri la naturo de drama iluzio, kiuj ankaŭ dominis dum tiu periodo. La realisma teatro, kiun la kortego de Karlo la Dua reportis kun si el Francujo je la restarigo de la monarkio en 1660, restis kun ni en tiu aŭ alia formo ĝis preskaŭ la nuna tempo. Pro pli ol koincido, dum tiu sama periodo certaj ideoj pri la naturo de tragedio mem, el Aristotelo tra la francaj kritikistoj Scaliger kaj aliaj, estis ankaŭ vaste akceptitaj. Mi aludas precipe al la novaristotela koncepto de la heroo. Li devas esti homo nobla, altideala, el la plej alta klaso de la socio, homo admirinda eĉ se difekta. Hamleto, aŭ Otelo, aŭ Antonio bone kongruas kun tia difino — sed Lear estas iom alia. Reĝo, li tamen falas en la plej mizeran *fizikan* humiligon. Noblulo, li tamen perdas sian noblecon en frenezo. La novaristotelaj kritikistoj, lertaj dividantoj kaj klasifantoj, malakrigas siajn fajnajn kritikajn instrumentojn kontraŭ la abrupta fakto de tiu ĉi dramo. Ĝi ne cedas al dividiĝo, ne submetiĝas al kategoriigo.

Oni povas plej bone kompreni la *intencojn* malantaŭ la verko (kvankam tio ne estas sama kiel kompreni la *verkon)* per konsidero de la epoko, kiu naskis ĝin. Ĝi estis plej verŝajne verkita dum la vintro de 1604—5, unu jaron post la morto de la Reĝino Elizabeta kaj altroniĝo de Jakobo la Unua, skoto kiu jam de pluraj jaroj (efektive de post la detroniĝo de lia patrino Mary Stuart) regis la propran landon. La deksesan jarcenton karakterizis granda kresko de intereso pri historio, precipe nacia historio, kiu paralelis kreskon de Anglujo kiel nacia ŝtato, kaj kiu ricevis entuziasman subtenon de la reĝa familio Tudor. La londonaj komercistoj legis t. n. »kronikojn« de la anglaj reĝoj; ili kune suferis kun navigistoj kaj esploristoj de la propra kaj antaŭaj epokoj per ties raportoj; dum tiu ĉi epoko aperis la unuaj lokaj historiistoj, la unuaj ŝtataj intervenoj por konservado de historiaj konstruaĵoj (tion ni ŝuldas al la Reĝino Elizabeta), la unuaj filologiaj studoj pri la anglasaksa lingvo.

La familio Tudor atingis la tronon post longa civila milito. Ilia pretendo al reĝeco ne estis aparte sekura, sed ili trovis en la historio belan aliancanon: la gloran pasintecon de la brita lando, kaj ĝia logika triumfo en eĉ pli glora nuntempo de la Tudor-a regno. Evidentiĝis, ke la familio devenis (kia surprizo!) de la Reĝo Arturo, legenda brita reĝo de la frua brita epoko. La familio intence kaj eĉ sisteme kultivis aristokratan revivigon de kavalireco; intelektuloj kunlaboris per kreado kaj retrovado de tuta mitaro brita — ke la angla eklezio reprezentas la fruan kristanan unuecon antaŭ la »skismo« de la roma epoko, ke la prabritoj atingis altan nivelon de civilizo, ke la praangla lingvo estas imitinda modelo por la nuntempo, ktp. Iasenca kulmino de tiu tuta tendenco estis la *Fereĝino* de Edmund Spenser, la granda patriotisma epopeo, kiu aperis en 1590 kaj 1596. Ĝi kombinas legendojn pri Arturo, la primitivan eklezion, kavalirecon, kun glorigo de la Elizabeta epoko — ĉion esprimante per lerta interplekto de la literatura formo de mezepoka romanco, intence arkaika lingva stilo, mezepoka moraleca superstrukturo, kaj plene aktuala politika kaj socia vidpunkto.

Spenser imitis la mezepokon ne ĉar li kvazaŭ vivis en ia ne plu aktuala epoko — nostalgiis pri mezepokaj valoroj ne plu eblaj en la kapitalista, urbana socio de Elizabetanoj. La Elizabeta amo al historio ne estis nostalgio, sed konscio pri pasinteco klare difinita. En la verkoj de la angla renesanco konstante oni trovas subtilan dialektikon inter la pasinteco kaj la nuntempo — kontrasto ebla nur al socio, kies pasinteco estas klare konceptita kiel tia, kiel pasinta.

Tamen, la rilato inter la pasinteco kaj la nuntempo estis, laŭ Renesanca koncepto, multe pli dinamika ol *ni* konceptas ĝin. La *Fereĝino,* ekzemple, koncernas la serĉon de la Princo Arturo por la Reĝino Gloriana. Ĉi-lasta estas alegoria reprezento de la Reĝino Elizabeta. Alidire, la verko spacigas la tempon: ĝi prezentas space la serĉon de la angla origino por la angla kulmino kaj tiel kadras la tutan anglan historion en literaturan formon.

La Renesanca Anglujo do estis lando rekonsciiĝanta pri ia pasinteco; kaj precipe fortiganta siajn pretendojn al nacieco ne nur per kreo de naciaj institucioj, sed ankaŭ per elforĝo de nacia pasinto. La familio Tudor, siaflanke, kaj precipe Elizabeta, emfazis la gravecon de nacia paco. Oni trovas konstante en Elizabetana literaturo aludojn al la graveco kaj plezuroj de paco, kaj

kontrastojn ekzemple kun Francujo, ŝirita de religia milito. Paco bonas por komerco, literaturo, urba kunvivado — kaj la Elizabetanoj zorge tenis tion en memoro. Ili legis, kaj ŝatis legi, pri la teruraj efikoj de civila milito en la frua angla epoko, kaj pri la gloraj streboj far certaj reĝoj kaj herooj krei naciajn unuecon kaj pacon.

Por sia dramo *Reĝo Lear*, surscenigita nur kelkajn jarojn post verkiĝo de la *Fereĝino* de Spenser, Shakespeare elektis bone konatan rakonton el la plej frua periodo de la brita historio — multe pli frua ol la rakontoj pri mezepokaj reĝoj, kiujn li trovis en la kronikoj kaj dramigis en pluraj siaj pli fruaj verkoj. En tiuj t. n. »historioj« rolis reĝoj, pri kies vivo la historio lasis multajn spurojn, kaj nobeloj, kies familioj foje ankoraŭ ludis decidajn rolojn en angla politiko. La historioj koncernis la historion de *Anglujo. Lear* pritraktas la historion de la praa *Britujo.*

Shakespeare tie ĉi elektis emfazi ĝuste la mitajn elementojn. Ĝuste kiel la erudiciuloj de la itala Renesanco trovis en la grekaj kaj romiaj mitoj la unuajn ombrajn manifestiĝojn de la kristanismo, same en tiu ĉi rakonto el antaŭkristana Britujo Shakespeare sugestias tiujn bazajn homajn interrilatojn kies religiajn kaj moralajn implicojn poste fiksis la kristana kredosistemo. Ĉar la eventoj de la dramo estas esence mitaj eventoj, la kriterioj de aŭtentikeco estas tute aliaj ĉi tie ol en verkoj kiel *Rikardo la Tria* aŭ *Henriko la Kvara.* Ni traktas ne pri agoj en la fluo de la historio, sed pri pratipoj. Ili prezentiĝas en sia nuda formo, sen la normalaj atribuaĵoj de probableco kaj kredebleco, kiujn postulas la realisma teatrarto.

Por emfazi la mitajn elementojn, Shakespeare ŝanĝis la rakonton. En Spenser kaj aliaj li trovis historion kun tiu »feliĉa« fino, kiun Nahum Tate poste redonis al ĝi, kaj laŭ kiu Cordelia venkas kaj restarigas la regnon de Lear. Ĉiuokaze, tiu rakonto donas bazan problemon, ke Lear regajnas sian tronon per franca interveno — eventovico, kiu apenaŭ kontentigus la furioze patriotajn anglojn de la epoko de Shakespeare. Sed, sendepende de tiu problemaro, Shakespeare evidente deziris emfazi aliajn elementojn ol nur tiuj, kiujn li trovis en la kronikoj kaj iliaj variantoj.

Unu pratipa motivo, kiu tamen kongruus kun »feliĉa« fino, estas la Humiligo de la Fiera Reĝo. Pluraj mitaj kaj mezepokaj rakontoj nin informas pri reĝo, kiu iras sin bani en rivero. Revenante al la bordo, li trovas, ke liaj vestoj kaj servistoj estas for. Lian reĝan lokon transprenis anĝelo, sendita de Dio por lin puni pro troa fiero. Liaj klopodoj rehavigi siajn vestojn, kaj ĉefe sian identon, malsukcesas. Li estas mokata kaj priridata. En kelkaj versioj li estas elĵetita en la tempestan naturon, kaj nur post ellerno de la naturo de humileco li pentas kaj regajnas sian tronon. Varianto de tiu pratipo estas kompreneble la humiligo de la malnovtestamenta reĝo Nebukednecar.

Unu el la centraj temoj de la dramo estas la rajtoj kaj devoj de reĝeco. La Renesanca humanismo kaj Elizabetanaj popularigantoj daŭre insistis, ke reĝo havas gravajn respondecojn al la popolo. Oni tion vidas tute klare en la »historioj« de Shakespeare — ekzemple en *Henriko la Kvina,* aŭ (malpli pozitive) en *Henriko la Sesa. Rikardo la Dua* emfazas la katastrofajn efikojn de malforta regado. La nova reĝo de Anglujo, Jakobo la Unua, eĉ verkis traktaĵon pri la rajtoj kaj devoj de la reĝo. La reĝo, laŭ la konservativa Jakobo (kaj ankaŭ, cetere, laŭ oficialaj predikoj de la anglikana eklezio) estas tera anstataŭanto de Dio. Lia respondeco servi Dion kaj nia respondeco servi la reĝon konsistigas la du flankojn de la ekvilibro de civila ordo. En tiu servo, do, Lear ne *rajtas* abdiki siajn respondecojn. Certe lia decido reteni »por ni / la reĝonomon, reĝajn atributojn,« dum li fordonas la efektivan potencon, konsistigas danĝeran miskomprenon pri la subtila rilato inter ceremonio kaj potenco; kaj lia anoncita intenco »tripartigi« la unuigitan regnon nepre ŝajnus ŝoka al Jakobana spektantaro, kiu ĝuste travivadis la klopodojn de Jakobo ne nur konservi la unuecon de Anglujo sed politike unuigi Anglujon kaj Skotlandon.

Kompreneble, la anoj de la familio Tudor zorge observis la kunligon inter la »Tudor-a« mito kaj la prospero de Anglujo. La Elizabetanoj ja tajloris siajn tradiciojn kaj historion laŭ la bezonoj de la angla ekspansio. Sed neeviteble la obstina, severa ambiciemo de multaj Elizabetanoj de tempo al tempo koliziis kun la tradiciaj valoroj. Sub Jakobo tiu koliziado fariĝis pli ofta, dum la financa potenco de la lando (reprezentata de la Parlamento) pli kaj pli dividiĝis de la ekzekutiva potenco (nome de la monarkio). Fina konsekvenco de tiu divido estis la Civila Milito (1642—49).

Oni vidas tiun kolizion en *Reĝo Lear* precipe ne en la ĉefrakonto, sed en la subrakonto pri Gloucester kaj liaj filoj. La tradiciemo de Gloucester estas nenio alia ol superstiĉo:

> Ĉi tiuj ĵusaj eklipsoj de la suno kaj luno entaŭsignas al ni nenion bonan. Kvankam la naturscienco povas pri tio rezonadi tiel kaj tiel, tamen la Naturo mem estas skurĝata de la kunsekvaj efikoj: amo fridiĝas, amikeco disfalas, fratoj dividiĝas. En la urboj ribelo, en la landoj diskordo, en la palacoj perfido, kaj la ligo inter patro kaj filo diskrakas. Ankaŭ ĉi mia fripono estas entenata de la antaŭdiro: jen filo kontraŭ patro; la reĝa moŝto falas el la natura inklino, jen patro kontraŭ infano. Ni jam travivis la plej bonan parton de nia vivo. Maĥinacioj, malsincero, perfido kaj ĉiaj ruinigaj malordoj nin sekvas maltrankvilige al nia tombo. (pĝ. 24)

Ni apenaŭ povas eviti konsenton kun Edmund kiam li rimarkas (en la grandioza prozo de la Kalocsay-a traduko):

> Superba farso de la mondo, ke, kiam nia fortuno velkas, ofte sekve de niaj propraj ekscesoj, ni akuzas kiel kulpajn pri nia missorto la sunon, la lunon kaj la stelojn. (pĝ. 24)

Sed la alternativo al la superstiĉo de Gloucester ŝajnas esti la egale danĝera inverso, kiu ignoras entute la formojn kaj ceremoniojn de la socio. Edmund, en tiu potenca malfermo de la dua sceno en la unua akto, deklaras sin servanto de la diino Naturo.

> Kial min
> submeti al la pesto de la moroj,
> kial do lasi min senheredigi
> de la skrupula juĝo de l'nacioj
> ĉar dekdu, eble dekkvar lunojn malpli
> mi aĝas ol la frato? Kial do
> bastardo, kial estus mi fiido,
> se same bonkreita al mi estas
> la korpstrukturo, same brava al mi
> la intelekto, bela la talio,
> kiel al fil' de iu virta damo? (pĝ. 20)

Kvankam Edmund prezentas popularan kaj iasence saĝan argumenton, ĝi komplete ignoras la kialojn por la heredaj k. s. leĝoj: ilia ekzisto subtenas la socian ordon — ĝuste tiun ordon, kiun Edmund tuj poste deklaras sin preta detrui. Laŭ lia difino »naturo« estas ĉio nesocia — la socio kun siaj moroj estas abomeninda. Gloucester, kompreneble, difinas »naturon« kiel »didonitan ordon« — kaj tio do inkluzivas socian ordon. Ni do vidas en Edmund kaj Gloucester ankaŭ konfliktajn vidpunktojn rilate la naturon de naturo mem.

La konsekvenco de la trompo far Edmund estas, ke Edgar devas alivesti sin, kaj interŝanĝi saĝon kontraŭ ŝajnigita frenezo por entute pluvivi. La unua trompo neeviteble trenas kun si atmosferon de ŝajnigo, alivestado, malsincero. Tiuj trajtoj en la subrakonto estas kompreneble eĥoj de la ĉefrakonto mem. Edgar unuigas en sia personeco saĝon kaj amon — kaj tiu amo al la patro neniel malaperas. Efektive ĝi estas pratipigita en tiuj korŝiraj scenoj, kiam la alivestita filo gvidas la blindan patron survoje al Dovro: fila ŝajnigo kaj patra blindeco en demona simbolo de la rilatoj inter la generacioj.

Daŭrigota



Bastiono de la fortikaĵo de Siklós

El la membroj de la Monda Konsilio de Eklezioj, la reprezentantoj de la eklezioj vivantaj en la socialismaj landoj renkontiĝis en Budapeŝto, prepare de la kvina sesio de MKE, okazonta fine de la jaro 1975 en Nairobi. En la kunveno, la kalvinana episkopo dr. Tibor Vargha analizis la teologiajn laborojn de MKE ekde 1968. Juvenalij, metropolito de Tula Belev prelegis pri „La eklezioj kaj la problemoj de la mondo". Prelegis ankaŭ du hungaraj vicministroj de eksterlandaj aferoj, J. Nagy kaj R. Garai, pri la problemoj de la paca kunekzistado kaj pri la novkolonialismo en Afriko. La partoprenintoj de la kunveno unuanime emfazis, ke ankaŭ la eklezioj vivantaj en socialismaj landoj devas doni siajn kontribuaĵojn al la ekumena dialogo, kaj ke la klara kaj progresema teniĝo de la eklezioj pri la grandaj problemoj de la homaro havas grandan signifon.

* * *

En la sudpanonia urbo *Pécs*, okaze de la *Kongreso de Turka Arto* oni transdonis, restaŭritan en sia plena belo, la ĝamion (ĉefmoskeon) nomitan laŭ paŝao Hassan de Jakovo. Konstruita en la 16-a jarcento, ĝi poste plurfoje difektiĝis, parte estis transkonstruita en kristanan kapelon, sed ĝia ekstera arkitekturo grandparte konserviĝis kaj ankaŭ la internaj dekoraĵoj postvivis sub la mortero, per kiu oni ilin tegis. Post konsento inter la ŝtato kaj la eklezio, ekde 1957 oni okupiĝis pri la restaŭrado de tiu monumento el la turka regado en Hungario. Multajn objektojn la restaŭristoj ricevis donace de la turka respubliko kaj dank' al tio, krom la tre fortimpresa moskea interno, oni povas vidi tie ankaŭ riĉan kaj interesan ekspozicion el la objektoj de la ĉiutaga turka vivo, el tekstilartaĵoj, fajencoj, miniaturoj ktp.

panoramo

Antaŭ jaroj oni observis, ke ĉe la piedoj de la monto Gellért, en Budapeŝto, Danubo plurloke ne glaciiĝas eĉ en la plej granda frosto. La fakuloj konkludis el tio, ke tie troviĝas varmaj fontoj en la fluejo. Fakte, la esploroj montris, ke tie fontoj kun akvo de 60—70°-a varmo fluas en Danubon grandkvante. Ekzemple en unu loko fontas mil litroj ĉiuminute. Antaŭ kvin jaroj komenciĝis la laboro kapti la akvon de tiuj fontoj. Ok tiaj termo-fontoj estis trovitaj sub la monto Gellért kaj por tiujn elkonduki oni konstruas tunelon mil metrojn longan. En unu-du jaroj finiĝos la laboroj, kaj tiam la elkondukita akvo nutros tri banejojn. Laŭ projektoj, oni formos tunelbanejon, ĉar sur la bordo inter Danubo kaj Gellért-monto la loko estus malvasta por konstruo de banejo.

* * *

Eksterordinaran hungaran numeron eldonis la itala fakrevuo MINERVA MEDICA, havanta internacian reputacion, disvastigata en kvaronmiliono da ekzempleroj en multaj landoj. La numero donas ĉiarilatan trarigardon pri pluraj branĉoj de la nuna hungara medicino. Oni disdonis ĝin al la partoprenantaro de la Torina Medicina kongreso, aranĝita je la memoro de Cesare Lombroso, mondfama kriminala antropologo-psikiatro de la 19-a jarcento. La hungara numero vekis grandan atenton inter la kongresanoj.

* * *

La *Belarta Mondsemajno*, iniciatita de la Internacia Asocio de Belartistoj — membro-organizaĵo de Unesco — estis riĉa je artaj okazaĵoj en Budapeŝto. Ĝin komencis la malfermo de la *III. Internacia Etplastika Bienalo.* Dum la semajno la eniro estis senpaga al ĉiuj muzeoj, oni projekciis filmojn de belartaj temoj en la kinejoj, oni organizis gvidadon en galerioj, prelegojn pri belarto. La *Belarta Fondumo* komencis eldoni serion da grandformataj reproduktaĵoj, t.n. „art-afiŝoj" (angle: „poster"); reprezentataj estas en la serio pentristoj ekde la mezepoka Majstro M. S. tra Csontváry, Rippl-Rónai, Derkovits ĝis la nuna generacio. Ankaŭ la televido donis belartan programon pli vastan ol kutime: sub la titolo „Liberiĝinta Arto" ĝi prezentis resume al siaj rigardantoj la hungaran belarton de la ĵusaj tridek jaroj.

Pál Kő: Memportreto

panoramo

Kecskemét, urbo sur la granda hungara ebenaĵo, aranĝis en septembro internacian popolmuzikan renkontiĝon. La riĉa programo okupiĝis inter aliaj pri la variaĵoj translimaj de la hungardevenaj popolkantoj kaj pri la aparta vivo de hungaraj melodioj migrintaj alilanden. Oni esploris la pentatongamecon kaj la uzon de malnovaj modalaj gamoj, kiuj estas malkaŝeblaj en preskaŭ ĉiu popolmuziko de Eŭrupo. La prezentitan materialon oni elkribris el pli ol 250 popolkantoj. Speciale interesa estis la ekspozicio prezentanta tre malnovajn muzikilojn.

* * *

En Kecskemét oni komencis la instruadon en la Muzikpedagogia Instituto nomita laŭ Zoltán Kodály. Studentoj venis interalie el Usono, Kanado, Svisio, Francio, Japanio. En la instituto oni lernas metodologion, muzikteorion, solfeĝon, ĥor-gvidadon, partiturlegadon, muzik-psikologion kaj folklor-muzikon. En praktikaj okupiĝoj la studentoj partoprenas en la kantkaj muzikfakaj ĝenerala lernejo kaj gimnazio, situantaj apud la instituto. La Kodály-metodajn muzikpedagogiajn sciencajojn instruas la plej emimentaj fakuloj.

* * *

Ni rajte fieras pri la Budapeŝta KURACISTHISTORIA MUZEO inaŭgurita antaŭ dek jaroj en la naskiĝdomo de *Ignác Fülöp Semmelweis*, „savinto de Patrinoj". La domo grandparte ruiniĝis en la dua mondmilito, sed estis restaŭrita kaj taŭgigita por muzeo. En 1964 oni komencis la registradon kaj aranĝadon de la kolektita muzeo-materialo; ĝi devenis el la diversaj muzeoj kaj bibliotekoj medicinaj kaj farmaciaj. Tial al ĝi apartenas ankaŭ la baroka apoteko „Ora Aglo" en Budaburgo, kie apotekhistoria ekspozicio estis aranĝita en 1974. La institucio aranĝas ekspoziciojn de tempo al tempo; la unua tia grandformata ekspozicio estis „Bildoj el la paseo de la kuracado" en 1968, kun materialo montranta la historion de la kuracado ekde tiu de la primitiva homo ĝis la tempo de la unua mondmilito. La muzeo eldonas ankaŭ sciencan revuon, la kvaronjaran „Communicationes de Historia Artis Medicinae". La institucio, krom la memoraĵoj de la nom-dona Semmelweis gardas ankaŭ tiujn de aliaj eminentuloj de la hungara medicinhistorio: Balassa, Markusovszky, Hőgyes, Korányi, Bókay, Nékám, se mencii nur kelkajn.

La Korto de Kuracisthistoria Muzeo



Preĝejo de apudbalatona vilaĝo Egregy

La eksterlandkomerca entrepreno „Kultúra" fariĝis 25-jara. Ĝi zorgas pri la eksporto kaj importo de pluraj milionoj da libroj, pluraj centimiloj da gramofondiskoj. Ĝia granda evoluo komenciĝis en la 60-aj jaroj: tiam ĝi fariĝis vere plenaĝa. Decida en tio estis la fondiĝo de la fremdlingva libroeldonejo „Corvina", kiun ankaŭ la esperantistoj konas el tri verkoj aperigitaj: la Tragedio de Madách, „Dudek horoj" de F. Sánta kaj poemkolekto de Petőfi. La firmao komencis ankaŭ libroeldonojn kunlabore kun eksterlandaj firmaoj. La „Anatomia Atlaso" de Kiss-Szentágothai aperis kunlabore kun la Thieme-eldonejo en Leipzig kaj ĝis nun atingis sian 58-an eldonon. Poemelekton de László Nagy Corvina eldonis kune kun la Oxford University Press. Pli kaj pli grandan debiton havas tradukoj de hungaraj sociosciencaj verkoj; la anglalingva eldono de elekto el la paroloj kaj intervjuoj de János Kádár, la germana kaj franca eldonoj de la libro de György Aczél: „Kulturo kaj socialisma demokratio" rikoltis grandan sukseson. Cetere — kiel la direktoro de la entrepreno komunikis —, la diversaj temoj ne estas samgrade serĉataj: en la okcidento nun, ekzemple, la matematiko estas la furora temo. Alia dankema kampo estas la muziko: la diskoj de la Hungara Muzikdisk-fabrika Entrepreno havas tre grandan debiton, kion komprenigas tio, ke lastatempe ili gajnis tridek gravajn premiojn. Multaj opinias, ke nia disk-eksporto konsistas precipe el hungaraj popoleskaj kantoj, sed la fakto estas, ke el la sepcent mil diskoj ĉi-jare eksportitaj nur ok procentoj estas tiuj kantoj ciganmuzikaj. La cetero prezentas muzikon de klasikaj kaj modernaj komponistoj aŭ veran kamparanan muzikon.

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

Mia rubriko de revuado de revuoj eniras la sepan jaron de sia vivo. Okaze de tio mi ne volas nin festi, nur medite bedaŭri, ke nia ekzemplo apenaŭ trovis imitantojn en la Esperanta gazetaro. Eble sole *F. de Diego* komencis serion kun la sama titolo, sed li, plorinde, plonĝis en la tempestajn ondojn de Hamburgo kaj de tie li povas al ni komuniki sole vekriojn. Tiamaniere ni ree estas sola en la areno. Tamen, kiel mi jam skribis ĉi tie, estus tre necese, ke la diversaj E-aj gazetoj iom pli zorgu unu pri la alia, menciante, konigante reciproke la artikolojn konigendajn. Se paroli sincere, mi trovas iom troa la indiferentecon de la E-aj gazetoj unuj kontraŭ la aliaj kaj opinias, ke la reciproka amika interesiĝo pli konvenus al la siprito de E-o.

HEROLDO DE ESPERANTO (14—15, 1975) vigla kiel ĉiam, provizas nin per diversaj agrablaj kaj malpli agrablaj novaĵoj el la mondo esperantista. Eble sole „Du similaj historioj" de *Ergoto de Bonaero* ne tre plaĉis al mi, ĉar atribui egalan probablecon al la konkero de nia tero far „bluaj aliplanedanoj" kaj al la konkero de Meksiko far *Cortez* estas ĥimero, kiu povis naskiĝi nur en kranio preskaŭ ĝiskreve plenŝtopita per scifiaĵoj. Pli ĝojinde estas, ke la gazeto, rekoninte la mizeran staton kaŭzatan de malapero de niaj literaturaj revuoj, pretas doni lokon al la E-a literaturo per rubriko nomata „Beletra angulo". Mi salutas la decidon de la gazeto kaj ankaŭ la rubrikoredaktonton *Aldo de' Giorgi.* (Parenteze: tio tamen estas nur almozo kaj ne povas trankviligi la koncernatajn konsciencojn.)

En KOMUNA ESPERANTO GAZETO (1975, febr. kaj apr.) artikoloj tradraŝis la poemojn kiel enigmojn nesolvindajn kaj ankaŭ la kompatindan Shakespeare kun liaj dramoj „grandparte enuigaj kaj supraĵaj". Nun *R. de Jong-Beukers* (1975, 9) je mia granda ĝojo, korektas tion, dirante, ke tiaj vortoj venenas la homojn kontraŭ la altvalora literaturo kaj tio estas nepardonebla. Tia korekto tre necesis por gardi la reputacion (ne de Shakespeare, sed de la gazeto).

LITERATURA FOIRO (1975, 31—32) preskaŭ eksplodas pro la „bros-problemo". Temas pri tio, ĉu *bros* estas substantiva radiko, aŭ verba; last-okaze oni devas brosi ne per broso, sed per brosilo. Mi trovas nur stranga la grandan ekscitiĝon ĝuste pri *bros,* ĉar temas pri io tute alia: ĉu la radikoj havas gramatikan karakteron aŭ ne. *Szerdahelyi* asertis, ke ili ne havas tian karakteron, kaj ke ties konstato fundamente ŝanĝas la direkton de la scienca esploro de E-o. La granda reago je tio koncernis ne la kompatindan broson, sed ĉi tiun novan ĝeneralan konstaton. Nun tamen la redakcio deklaras, ke la laboro de *Szerdahelyi* havas ĝis nun esploran signifon kaj li ankoraŭ ne atingis definitivan rezulton. Mi opinias, ke per ĉi tiu prudenta deklaro trankviliĝos la tuta afero. — *Giorgio Silfer* daŭrigas siajn intervjuojn; nun venis vico al *Alphonse Matejka,* redaktoro de „Cosmoglotta", organo de Interlingue. La intervjuon mi ne trovas speciale interesa. Ni sciiĝas, ke s-ro Matejka, en la nomo de Interlingue „neglektas la amasojn" kaj serĉas nur sciencistojn kaj klerulojn. Interlingue ne havas literaturon (certe ankaŭ ĉi tiu estas „amasa afero"). Kurioze, Matejka vidas malprogreson en tio, ke lastatempe ne aperas novaj lingvoprojektoj. Li atribuas tion al la „konsumismo" kaj amuziĝemo, kaj mi preskaŭ aŭdas lian profundan suspiron.

LA BRITA ESPERANTISTO (1975, sept.) publikigas artikolon de *Karl Pov* kun la titolo „Malplimulto, malvenkinte, malkontentas". Ĝi okupiĝas pri la atakoj kontraŭ UEA, baze de ties ne-neŭtraleco. Ĉefa punkto de tiuj akuzoj estas artikoloj aperintaj en Bulgara Esperantisto. Nun, la aŭtoro rimarkigas, ke politikaj artikoloj en la Bulgara Esperantisto kaj ankaŭ en la Israela Esperantisto aperis jam dum la prezidanteco de Lapenna kaj de li venis neniu protesta vorteto kontraŭ tio. La fakto estas, daŭrigas la artikolanto, ke UEA havus tiaokaze solan punrimedon: eksigi la koncernan landan asocion el UEA. De tio sendube la asocio suferus. Tion vidis *Lapenna* dum sia regado kaj ne malpli klare vidas la nunaj gvidantoj. Mia modesta opinio estas, ke UEA respondas nur pri siaj propraj oficialaj agoj, sed neniel pri la politika aktiveco de siaj membroj; ĉi lasta postulo sekvigus ja la plej kuriozajn situaciojn. — *Reto Rossetti* direktas publikan leteron al la prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj en ĝi li esprimas sian indignon pri tio, ke oni atribuas al li artikolon verkitan kontraŭ la vortfara teorio de Kalocsay. Li alvokas ĉiujn legantojn atesti, ĉu iam ili vidis de li tian artikolon. Mi opinias, ke lia indigno sufiĉe esprimas sian sintenon en tiu ĉi afero, do ĉiu plua esploro estas superflua: ĉi tio ja ne estas honorafero. — Ĝoje mi salutis la plidikiĝon de la gazeto (lastatempe ĝi danĝere magriĝadis) kaj la riĉan rubrikon de recenzoj.

DER ESPERANTIST (1975, 4) aperis ree kun riĉa programo. *Detlev Blanke* finas sian longan artikolon pri la tradicioj de la germana-soveta amikeco en la laborista E-movado. — Okaze de la internacia jaro de la Virino la gazeto memoras pri la virinoj farintaj bonan servon al E-o ekde *Klara Zilbernik.* Ĉe *Magda Carlsson* estas menciite, ke kelke da ŝiaj Baudelaire-interpretoj estas majstraj. Ĉi tion mi rekomendas en la atenton de E. de Kock. — *D. Blanke* (1975, 3) plu artikolante pri la demando, kiel plivigligi la grupojn, diras observindaĵojn pri la danĝero de sekteco t.e. maltoleremo, mallarĝspiriteco, forfermiĝo disde la ekstera mondo. Tamen, lian deziron elŝanĝi la Himnon mi ne povas konsenti, eĉ trovas iom maltolerema. — *Dro M. J. Isajev,* Moskvo raportas pri la diversaj direktoj de vigla scienca laboro en Sovetio koncerne la internacian lingvon; la ĝojindajn faktojn de lia artikolo niaj legantoj jam konas el la intervjuo, kiun li donis al *András Sugár* (H. V. 1975, 4).

LINGVO KAJ LOGIKO

Al ĉi mia supratitola artikolo s-ro Luis Mimó reagis denove per longa letero, vere tro longa por esti publikigata en tuto; nia profilo ja ne estas lingvistika. Tamen, por plenumi lian deziron, ke la legantoj povu rigardi la aferon ankaŭ el alia angulo, mi konigas lian leteron parte per citaĵo, parte per resumoj, klopodante je honesta fideleco.

Li skribas: „Malgraŭ koincidoj (kun la vortfara sistemo de mi eksplikita, K.K.) niaj analizoj havas profundajn, principajn diferencojn, ĉar li celas pravigi la Zamenhofan uzon kontraŭdiran; mi, Zamenhofan sistemon regulan, sen esceptoj, la tutan lingvon sen esceptoj."

Poste li eksplikas (mi klopodis lian tekston plifaciligi):

A. La simplaj verbaj adjektivoj devenas rekte el verbo kun senco same aktiva kiel -anta, kvankam malpli konkret-aga: mortiga veneno, puna ekspedicio, pikaj haroj, helpa lingvo.

B. Verba adjektivo antaŭata de adjektiva radiko devenas el prepozitivo kun la prepozicio „kun": rapidkura besto = besto kun rapida kuro; facilmova danco — danco kun facilaj movoj.

C. Verba adjektivo antaŭata de substantiva radiko estas kunmeto adjektivigita en tuto: voĉdona = voĉdono-a. Ili ne povas havi aktivan sencon: leterskriba papero (ne: papero kiu skribas); vangofrapa bruo (ne bruo kiu frapas).

D. Verba adjektivo kun „sen" devenas de prepozitivo kaj la senco estas jen pasiva: senĝena rideto, sensanĝa teksto, senpuna (nepunata) krimo, jen aktiva: senrevena tempo, senscia krudulo, senmorta poeto. — Rimarkinde, ke formoj analogaj kun „kun" ne uziĝas: oni ne diras „kunpuna krimo", „kunmorta verko". Lingvo kaj logiko.

E. Memmortiga, flugiletenda, lumoporta analiziĝas: „mortiga pri homo", „etenda pri flugilo", „porta pri lumo".

F. Se senutila, senforta, senprudenta estas bonaj, nelogike estas ne juĝi bonaj ankaŭ „senbela", „sendelikata", „senbona".

Nu, se paroli pri la citaĵo, mi, homo falema, ne povas min deteni de ironio. Laŭ la citaĵo, la e-istoj, preskaŭ dum jarcento, palpadis en la mallumo de la Zamenhofaj kontraŭdiroj, uzante la monstrajn voĉdoni, partopreni, kortuŝi k.s., ĝis venis Luis Mimó kun sia kandelo de logiko. Ŝajne, tamen, tiu kandelo ellasis pli da fumo ol da lumo, ĉar ĝi ne savis sian tenanton de groteskaj logik-eraroj, kiel mi montris en „Lingvo kaj Logiko".

Koincidoj inter niaj analizoj ekzistas certe, ĉar la analizregulojn malkovris mi, kaj L. Mimó nur fuŝis ilin per ilia rigidigo.

Ni rigardu tiujn analizojn. Por tio aktuale ni bezonas du regulojn.

1. En adjektivo-fina vortkunmeto, la fina adjektivo substantivigas la antaŭan vorton: prespreta = preso-preta = preta je preso.

2. La finaĵo-a, laŭ la Fund. Gram. „estas rigardata ankaŭ kiel memstara vorto". Ĝi do povas havi propran sencon, eĉ sencojn. Ili estas: a) estanta . . . (nobela persono = persono estanta nobelo); 2. karakterizata de . . . aŭ -kvalita (tima homo = homo karakterizata de timo; bruta homo = brutkvalita homo); c) -rilata aŭ -apartena (urba bosko = urb-apartena bosko). La finaĵo estas adjektiva elemento, sekve substantivigas la antaŭan vorton laŭ la regulo l.

Per tiuj du reguloj oni povas analizi ĉiujn vortkunmetojn troviĝantajn sub A-F. Mortiga veneno = mortig-kvalita veneno, rapidkura besto = besto karakterizata de rapida kuro, leterskriba papero = papero rilata al leterskribo; senĝena rideto = rideto estanta sen ĝeno; senrevena foriro = foriro estanta sen reveno; flugiletenda birdo = birdo karakterizata de flugiletendo; senprudenta homo = homo estanta sen prudento.

La plej vulgara klarigo de la analizo estas jena: la finaĵo -a substantivigas la vortkomplekson kiel tuton. Se tiu substantivigita komplekso povas ekzisti kune laŭ la vortfaraj leĝoj, tiam ĝi restas kune: (leterskribo)-a, (voĉdono)-a. Se ilian kuneston malpermesas vortfara leĝo, ili disfalas kaj interrilatas sintakse: rapidkura = (rapida kuro)-a, facilmova = (facila movo)-a; senĝena = (sen ĝeno)-a; senutila = (sen utilo)-a.

Estas erare, ke kunmetaĵoj laŭ C. ne povas havi aktivan sencon. Jen: gastama mastro (mastro kiu amas gaston); scivola infano (infano kiu volas scion); pacdezira homaro (homaro kiu deziras pacon).

Rilate al F. en la vortaro de Bokarev (E-Rusa) mi trovis la vortojn senegala, senforta, senlaca, senprudenta, sentaŭga, sentaŭgulo, senutila. Gramatikisto devas esti ne leĝdonanto, sed leĝtrovanto; li devas formojn ne ekskomuniki, sed klarigi. Kial oni uzas senforta, senlaca, dum neniu uzas senbela, senbona, tion mi klarigos tuj, se L. Mimó al mi klarigos, kial oni uzas senmona, sendanĝera, dum neniu uzas kunmona, kundanĝera.

Pri kortuŝi, partopreni ks. mi eble parolos, se la redakcio indulge disponigos al mi lokon. La afero, nome, estas iom tro longa.

K. KALOCSAY

D-ro Ferenc László

Lukto por la viviga akvo

Ne malhavebla elemento de nia vivo estas la pura akvo valora kiel trezoro. Ne estas do mirinde, ke ekde pratempoj la homo konstante luktas por la vivodona akvo. Ankaŭ la formiĝo de la evoluintaj malnov-epokaj civilizacioj elokvente pruvas, ke la baza kondiĉo de la evoluo estis la kreo de la favoraj priakvaj cirkonstancoj. Kie tiu favora baza kondiĉo iakaŭze fariĝis malfavora, aŭ ĉesis, tuj aperis la konsekvencoj: la socian-ekonomian evoluon ŝanĝis rapidritma dekadenco. Ofte vastegaj teritorioj transformiĝis en senfruktan dezerton kaj senpopoliĝis pro la akvo-manko. Ĉio-ĉi pruvas, ke la akvo havas determinan rolon en la vivo de la homo, la akvo kaj socio estas en konstanta inter-efiko unu kun la alia.

En la sekvantaj ni vicigas kelkajn ekzemplojn de la pasint-epokaj renomaj priakvaj laboroj.

En Cejlono ĉ. la 5a jarmilo a.K. oni faris la unuajn artefaritajn baraĵ-lagojn. En Hindio en la 4a—3a jarmiloj a.K. troviĝis jam urboj (Mohenjodoro Harray) kun trinkakvo-provizado, kanalizacio (eĉ feĉigejoj*), komunaj banejoj, kaj pro la seka klimato oni irigaciis el pluraj dekmiloj da artefaritaj lagoj.

En Egiptio ĉirkaŭ 2200 a.K. la faraonoj metis la imposton por la irigaciaj mastrumaĵoj surbaze de la akvonivelo legita sur la akvo-mezuriloj de Nilo. 100 jarojn pli frue en Ĉinujo oni faris grand-volumenajn kontraŭ-inundan kaj kanalizan laboron, eĉ boris 500-metrojn profundajn putojn.

La praloĝantaro de Babilonio, la Sumeroj kanaligis la riverojn Tigro kaj Eŭfrato cele de navigado kaj irigaciado. La du riverojn ili interligis per la navigebla Reĝo-kanalo. Por teni sekaj siajn tombokamerojn jam ĉirkaŭ 1900 a.K. ili faris drenadon per argilaj tuboj. Siajn praajn urbojn (Babilono, Ninive, Ur) provizis per argiltuba akvokondukilo kaj masonita kanalizado.

La unuan navigeblan kanalon inter Mediteraneo kaj Ruĝa Maro konstruis la Egiptoj inter la jaroj 600—280 a.K.

En la tempo de la komenco de nia erao en la priskriboj de Frontinus kaj Vitruvius (la arkitekto kaj milit-inĝeniero Polio Vitruvius vivis en la tempo de Cezaro kaj Aŭgusto) ni renkontas la grandegajn akvokondukajn kanal-pontojn (aquaduct) de la romianoj. Krom trinkakvo-kondukaj kaj kanalizadaj retoj la romianoj konstruis kampajn akvo-forkondukajn kanalojn kaj digojn, krome funkciigis akvomuelejojn.

La plej primitiva kaj plej malnova formo de la akvo-energiejoj estas la akvo-rado. Plur-miljaraj postsignoj de la apliko de akvo-rado estas troveblaj en Ĉinujo, kie oni pretigis la granda-diametran radon el bambuo kaj uzis ĝin por levi akvon kaj mueli grenon.

En Eŭropo la unuan artezan puton oni estigis en 1126, en la grafujo Artois de Francio.

La unua ŝipo-kluzo estis konstruita en Italio en 1253.

En la evoluo de la profitigo de la akvoforto estis grava paŝo la invento de la turbino. Kiel inventinto de la turbino estas rigardebla Andreo Johano Segner, filo de nia patrio.

En la 19a kaj 20a jc. kun gigantaj paŝoj evoluis la akvo-konstruado. Tion ebligis la spertoj kaj esplor-rezultoj kolektitaj en la pasintaj jarcentoj.

Ankaŭ el la plej signifaj priakvaj kreaĵoj de la pasinta jarcento valoras mencii kelkajn:

La 160 km-ojn longa Sueza-kanalo konstruiĝis inter 1859—1869.

La kanalon ĉe Korinto (1881—1893) projektis kaj konstruis la hungara inĝeniero Béla Gerster, komisiite de la same hungara István Türr.

En la konstruo de la Panama-kanalo (1881—1915) havis iniciatan rolon la hungara generalo István Türr.

En Appleton (Usono) oni konstruis en 1882 la tutmonde unikan elektro-produktan akvo-energiejon.

En la 19a jc. komenciĝis kaj ankaŭ nuntempe daŭras tiu integra akvo-ekonomia agado, kiu serĉas la interligojn de la efikoj ĉe la priakvaj kreaĵoj kaj evoluigas la pluajn necesajn interrilatojn. La integra akvo-ekonomio bezonas socian organizitecon, pli intensan laŭplanecon, pli bonan fundamentitecon, vastan superrigardon kaj antaŭvidon. Antaŭ la 19a jc. la akvaj konstruoj servis nur unusolan celon (ekz. nur trinkakvo-provizadon, aŭ nur inundo-ŝirmadon ktp.) kaj estis rara tia akvomuelejo, en kies akvorezervujo oni ankaŭ bredis fiŝojn, aŭ per kies akvo oni irigaciis. Sed de tiam la multekoste konstruitaj akvaj kreaĵoj jam ĉe la projektado estas destinitaj por servi plurajn celojn. (Ekz. iu akvonodo servas samtempe por akvo-rezervado, utiligo de akvo-energio, navigado, trinkakvo-provizado, akva sporto kaj ripozumo.*)

Komence la homo uzis malmulte da akvo. Dum li vivis izolite, li mem produktis la akvon por

---

* *feĉigejo: loko, kie oni purigas la pro kemiaĵoj kaj homa ekskremento ktp. malpuran akvon de la komunuma kanalizacio per surgrundigo de la suspensiaj solidaj elementoj, antaŭ la enfluigo en la riveron, lagon ktp.*

* *ripozumi: refreŝiĝi korpe kaj spirite per sinbanado, promenado, sporto, ludo kaj ripozo en bela, bonaera, laŭeble apudakva aŭ monta regiono, post la laciĝo de la labortagoj.*

kontentigi siajn personajn bezonojn. Proksime al sia loĝejo aŭ domo li fosis puton kaj de tie li ĉerpis la necesan akvo-kvanton.

Ĉar la akvo-debito de tiaj fositaj putoj estas limita kaj la surterigo de la akvo postulas penigan laboron, sur tiu ŝtupo de la evoluo la akvo-pretendo inkluzivis nur la trinkakvon, krome la bezonojn de la lavado, sinlavo kaj la kuirejo.

Esence ŝanĝiĝas la situacio, kiam la homoj amasiĝas en loksidejojn, en urbojn. La popol-denseco, la pli alta kulturo necesigas kontentigi la bezonojn per centra akvo-provizado. Tio signifas komforton, kaj tiam la akvo-pretendoj salte kreskas, fariĝas memkomprenebla la pretendo pri banĉambro ktp.

Sed samtempe kun la kresko de la kulturo kaj la amasiĝo en urbojn aperas ankaŭ aliaj, pli novaj akvo-bezonoj: la akvumado de la stratoj, placoj parkoj, krome la ne-preteratendebla akvo-konsumo de la komuninteresaj institucioj.

Apud la menciitaj prezentas sin kun granda akvopretendo ankaŭ la industrio.

Ĉio ĉi rezultigas, ke dum la akvo-konsumo de la aparte vivantaj familioj ne superas la tage 20 litrojn por unu persono, la persona akvo-bezono de la urba loĝantaro hodiaŭ atingas jam plurajn centojn da litroj.

Sed ofte okazas, ke en kelkaj pli grandaj loksidejoj la akvo rapide forkonsumiĝas pro la plimultiĝo de la loĝantaro. Tio necesigas la kondukilan alportadon de la akvo ofte el plurcent-kilometra distanco. Tiel ekz. oni certigas la akvo-provizadon de Los-Anĝeleso el la rivero Kolorado per 400 km-ojn longa kondukilo. Dumvoje la akvo estas pumpita 500 m-ojn alten. Ankaŭ en nia lando, ekz. la akvo-provizadon de Pécs oni solvas el Danubo tra 42 km-ojn longa kondukilo. Ni rekontas ankaŭ la praktikon, kiam oni klopodas gajni trinkakvon el la sala marakvo, por tiel transponti la malfacilojn de la akvo-provizado.

La ritmo de la kresko de la akvo-konsumado en la industrio kaj agrikulturo estas multe pli rapida ol tiu de la persona konsumo.

Ni pripensu nur, ke al la produktado de unu tuno da papero aŭ fero estas necesa ĉ. 300 m^3 da akvo. Sed kreskas la akvo-konsumado de la industrio ankaŭ pro tio, ke venas al la merkato ĉiam pli novaj produktoj, por kies produktado la industrio pliintensigas sian akvo-pretendon (ekz. ĉe fabrikado de plastoj, aŭ pli novaj medikamentoj). Signifan krombezonon estigas tio, ke la industrio aplikas ĉiam pli bonajn, pli perfektajn produkto-metodojn, pli evoluintan teknologion. La plialta-tensiaj kaldronegoj kaj la pli rapide rotaciantaj maŝinoj postulas pli efikan malvarmigon, la produktado de kemiaĵoj bezonas plurfojan lavon, purigon ktp. Evidentas do, ke ĉe la elekto de teritorio por la celoj de la industrio, inter la ceteraj postulaĵoj nuntempe oni devas jam pesi kiel eksterordinare gravan faktoron la eblecon de la sekura akvo-provizado.

La akvo — pretendo de la agrikulturo kreskas interalie ankaŭ pro tio, ke tutmonde oni ekkultivas ĉiam pli novajn — ofte ĝis nun tute senfruktajn —

La lago de Pécs



Moderna purigejo por poluci-akvo

La akvonodo ĉe la vilaĝo Kisköre



teritoriojn. Kie tio jam ne estas ebla, tie oni strebas al plia intensiveco, t.e. sur la sama teritorio oni klopodas produkti laŭeble pli multe, unuavice helpe de irigaciado. Sed egale, ke temas ĉu pri la unua, ĉu pri la dua solvo, preskaŭ ĉiam en ambaŭ kazoj oni rekontas la problemon, ke la antaŭkondiĉo de la plenumo de la tasko estas la havigo de multe pli granda kvanto da akvo. Tiucele oni eĉ aliigas jam la flu-direkton de la riveroj, aŭ per konstruo de ŝveligaj digoj kaj grandegaj akvo-rezervujoj certigas la necesan akvo-kvanton.

Sed la akvo-pretendoj manifestiĝas jam ne nur en la pligranda-kvanta konsumado. Estas jam eksterordinare grava ankaŭ tio, ke ni havu pli bonan, pli puran akvon.

Pro tio, ke — sekve de la disvastiĝo de la industrio — la polucio de la akvoj rapidritme pliiĝas, la profitigo de la riveroj kaj lagoj por akvo-provizaj celoj fariĝas iom post iom pli multekosta kaj pli komplika. Same kaŭzas ne malpli grandan zorgon la gajno de akvo kun konvena kvalito por kaj la industrio kaj la agrikulturo.

Estas videble, ke la lukto, kiun la landoj faras, por havigi al si akvon de necesaj kvanto kaj kvalito, estas neniel pli malgranda ol tiu batalo, kiun oni faris dum jarcentoj kaj faras ofte ankaŭ nuntempe kontraŭ la sovaĝiĝintaj akvoj por bridi ilin.

Jam hodiaŭ, sed ankoraŭ pli en la estonteco la lukto cele de la utiligo de la akvoj estos sukcese efektivigebla nur, se ni faras laŭplanan akvo-ekonomion, ĉar la akvo ne estas je nia dispono en kvanto senlima.

Ju pli malfavoraj estas la natur-cirkonstancoj vidpunkte de la kontentigo de la akvo-pretendo de la socio, kaj ju pli altan evoluo-gradon atingis iu socio, ĉiam des pli grava fariĝas la signifo de la laŭplana akvo-ekonomio.

La akvo, kiel krudmaterialo, konsumvaro kaj laborilo, ĉiam pli influas la evoluon de la produkto-fortoj. Fariĝis nekontesteble, kel la akvo estas unu el la plej gravaj ekonomiaj havoj, kiun oni devas racie administri kaj kiun oni devas gardi.

Tiu grava rolo, kiun la akvo ludas en la ekonomia vivo kaj evoluo de iu lando, fariĝas evidenta, kiam eksterordinaraj fortostreĉoj estas necesaj, por certigi tiun gravan faktoron en la dezirata kvanto kaj kvalito. Kaj tie ĉi temas ne nur pri dezertaj teritorioj, aŭ certaj marbordaj regionoj, kien oni devas alporti la akvon de maproksime, aŭ produkti ĝin per sensaligo, sed ankaŭ pri tiuj teritorioj, kie kvankam troviĝas akvo, sed ĝi ne kontentigas la bezonojn.

La sekvo de la kreskanta akvo-foruzado kaj polucio estas, ke la utiligeblaj provizoj de la ĉirkaŭaĵo elĉerpiĝas kaj pro tio pliiĝas la malfacilaĵoj de la akvo-ekspluato. La valoro de la pura akvo konstante altiĝas, ĉar la kontentigo de la pliiĝantaj akvo-pretendoj necesigas ĉiam pli multe da sciencaj, teknikaj kaj ekonomiaj intervenoj, kiuj postulas ĉiam pli grandajn elspezojn.

El ĉio ĉi sekvas, ke en la lastaj tempoj tutmonde — same ankaŭ en nia lando — la signifo de la akvo-ekonomio kreskis. Fariĝis unusenca kaj ĝenerala la rekono, ke la akvo-ekonomio estas unu el la gravaj fundamentantoj de la soci-ekonomia evoluo kaj influas vast-aree tutan vicon de la kondiĉoj de la evoluo.

Sur ĉiu kontinento de nia Tero komenciĝas fariĝi ĝenerala la praktiko, ke la akvo-ekonomiaj planoj de ĉiam pli multe da landoj konturigas por longa periodo antaŭe la dinamismon de la kresko de la pretendoj, la mezuron de tiuj pretendoj kaj la manieron de ilia kontentigo. Estas ĝojiga fakto por ni, ke ankaŭ nian landon ni povas vicigi inter tiujn landojn.

La breĉo inter la donoj de la naturo kaj la pretendo de la socio koncerne la akvo-ekonomion, konstante pliprofundiĝas. Tiu profundiĝo igis necesa la celkonscian intervenon de la socio en la naturan cirkuladon de la akvo. Tio signifis la kunagordigon de la naturaj kaj sociaj procezoj, kiuj — lige kun la akvo — efikas multfacete kaj komplike unu sur la alian reciproke. Alivorte ĝi signifis la formadon de la moderna sistemo de la akvo-ekonomio.

El la geografia situo, natur-cirkonstancoj kaj ekonomiaj rilatoj de Hungario sekvas, ke en nia lando la akvo-ekonomio havas eksterordinare grandan popol-ekonomian signifon.

Karakterizaĵoj de la naturo

Sur la teritorio de la lando renkontiĝas diversaj klimataj, reliefaj, geologiaj zonoj kaj formiĝas specifaj cirkonstancoj rilate temperaturon kaj precipitaĵon. La jara averaĝo de la precipitaĵo estas 620 mm, ĝiaj ekstremaj valoroj: 300 kaj 1200 mm. La jara meznombra valoro de la forvaporiĝo estas 500—600 mm. Nur ĉ. 10% de la precipitaĵo nutras dum defluo la surfacan akvo-stokon aŭ akumuliĝas en la grundo, 90% forvaporiĝas.

Precipa parto de la akvo-kolekta teritorio de niaj akvo-fluoj kuŝas ekster la limoj de la lando. El tio sekvas, ke sur la kvanton de la profitigebla akvo-provizo kaj sur la kvaliton de niaj surfacaj akvoj signife efikas la enmiksiĝoj en la translimaj partoj de la akvo-kolektaj teritorioj (kreskanta akvo-konsumado, akvo-rezervado, akvo-transkonduko, aliigo de la defluo-rilatoj kaj polucio).

La distribuo de la surfaca akvo-provizo estas malfavora. La tri grandaj riveroj de la akvo-sistemo estas: Danubo, trafluanta la landon en 417 km-a longeco, Tiso, tratranĉanta en 600 km-a longeco la Hungaran Grand-Ebenon kaj Dravo, en 140 km-a longeco plejparte limrivero inter Hungario kaj Jugoslavio. 90% de la surfaca akvo-provizo koncentriĝas en la fluejo de tiuj riveroj, pli granda parto en la akvo-sistemo de Danubo kaj Dravo, kaj sume nur 10% en tiu de Tiso.

Al la grandaj riveroj aliĝas la malgrandaj akvo-fluoj en Transdanubio kaj Nord-Hungario kaj la artefaritaj kanalsistemoj sur la ebenaĵaj teritorioj. La denseco de la reto de la akvo-fluoj estas malalta (sume po 300 m sur unu km^2; en Aŭstrio 1 km en Ĉeĥoslovakio 700 m).



La kluzo ĉe vilaĝo Békés sur la rivero Körös

La intenseco de la akvofluoj estas ekstremeca. La proporcioj de la minimuma kaj maksimuma akvodebitoj ĉe Danubo estas 1 : 15, ĉe Tiso 1 : 80, kaj ĉe la pli malgrandaj akvofluoj tiu proporcio povas esti unu per pluraj miloj. Pro tio la tempa distribuo de la akvo-provizo estas malegala.

La laŭ-teritoria distribuo de la akvo-konsumaj lokoj kaj tiu de la lokoj de akvo-provizoj esence diverĝas. Jen la kaŭzo, ke sur kelkaj teritorioj — unuavice en la valo de Tiso kaj en la areo de Meza-Transdanubio — en la pli sekaj jaroj estiĝas gravaj akvo-mankoj.

Unu kvaronon de la teritorio de la lando konsistigas ebenaĵo kuŝanta pli profunde ol la inundo-nivelo de la riveroj. Tiun malaltan teritorion endanĝerigas la superakvo de la inundoj, malsupren-fluantaj el la ĉirkaŭaj montoj kaj krome la tn. internaj akvoj (alinome: surkampaj akvoj t.e. la restaĵo de la loka precipitaĵo, kiun nek la grundo povas forglui, nek la kanaloj povas forkonduki — rim. de la tr.).

La akvo-geologiaj rilatoj estas favoraj, al tio estas ŝuldeble, ke la lando disponas pri konsiderinda subgrunda akvo-provizo.

La formiĝo de la moderna akvo-ekonomio

La kresko de la kontraŭeco inter la pliiĝantaj soci-ekonomiaj pretendoj kaj la distribuo de la akvo-provizoj laŭ tempo kaj loko, trudis la homan intervenon en la naturan cirkuladon de la akvo.

En konvenaj kvanto kaj kvalito, en dezirata loka kaj tempa distribuo la akvo estas disponigebla por la popol-ekonomio nur koste de signifaj sociaj oferoj. Pro tio la rektan ekposedon de la akvo iom post iom devas anstataŭi la akiro kaj manipulo de la akvo kaj la influado de la akvo-produktado de la naturo konforme al la bezonoj de la socio.

Komence tiuj intervenoj estis direktataj por preventi la malutilajn efikojn de la akvoj. En la posta etapo de la evoluo aperas aktivadoj celantaj organizite profitigi la akvon. Tiuj aktivadoj — disvastiĝintaj sur ĉiam pli granda teritorio — estigas reciprokan inter-efikon unu kun la alia, aliigante la kvanton kaj kvaliton de la akvo-provizoj kaj ilian lokan kaj tempan distribuon.

En Hungario la formiĝo de la akvo-ekonomio — kun atento pri la specifaj trajtoj de nia lando — sekvis la ĝeneralan linion de la evoluo.

Meze de la pasinta jarcento la artefarita interveno en la akvo-cirkuladon komenciĝis per la estigo de inundo-ŝirmaj konstruaĵoj kaj per river-reguligaj laboroj. Sub la efiko de la malvolviĝanta industriiĝo kaj la komenciĝanta urbanizado, ĉe la jarcento-turno komenciĝis jam ankaŭ la pli intensa profitigo de la akvo, lige kun certaj sociaj-ekonomiaj agadoj. Tion sekvis la sistema agrikultura utiligo de la akvo konekse kun la pli intensa evoluo de la agrikulturo. Kiel plua paŝo ekestis la neceso pri laŭplana administrado de la akvo-provizoj.

En la pli frua fazo de la socia-ekonomia evoluo oni okazigis la akvo-aferajn intervenojn kadre de la popol-ekonomiaj branĉoj, kun akcesora karaktero. Poste tiu akcesora rolo grade paliĝis kaj ĉiam pli emfazite reliefiĝis la memstara karaktero de la akvo-ekonomio.

Nuntempe la akvo-ekonomio kroĉiĝas jam en

Sulka akvumado

kompleksa maniero kaj sur vasta kampo al la aktivado de la diversaj popol-ekonomiaj branĉoj, al la regiona evoluigo de la produktado kaj al la loksidiga politiko. Ĝia efiko vastiĝas sur granda areo (kelka-kaze, surbaze de ratifikitaj interŝtataj interkonsentoj, ankaŭ trans la limojn de la lando), samtempe estigas regulitan interrilaton inter la akvo-ekonomioj de tiuj areoj kaj de la mastrumantaj unuoj.

El la supre-diritaj evidentas, ke la nuntempa moderna akvo-ekonomio esploras la priakvajn fenomenojn ne nur konekse kun la natura ĉirkaŭmondo kaj ne nur lige kun la iloj kaj procedoj aplikataj por transformi la naturajn hidrologiajn cirkonstancojn. Ĝi rigardas ilin samtempe en reciproka interefiko kun la socia-ekonomia medio. La akvo-ekonomio ne limiĝas nur je ŝirmado kontraŭ akvo-damaĝoj, nek nur je ekspluato de la akvo kiel naturdonita energio-fonto. Sed en kompleksa maniero inkluzivanta la naturajn akvo-cirkonstancojn, ĝi klopodas reguligi la akvon. Tio estas: ĝi pli-rapidigas aŭ pli-malrapidigas la surteran kuradon de la akvo, por certaj tempodaŭroj ĝin retenas, utiligas ĝin ankaŭ en pluraj fojoj, transformas ĝiajn materiajn ecojn kaj kunordigas la diversajn eblecojn de ĝia ekonomia ekspluatado.

En nia lando la akvo-ekonomio, respondanta la postulojn de nia epoko, formiĝis inter novaj socia kaj ekonomia cirkonstancoj. La akvo-ekonomio elpaŝis el siaj malvastaj kadroj, kiu limigis ĝin nur je agrikulturo-karakteraj kaj akvodamaĝo-ŝirmaj laboroj. Ĝia agadkampo vastiĝis kaj space kaj koncerne ĝian taskaron: ĝi fariĝis unu el la branĉoj de la popol-ekonomio, kiu branĉo inkluzivas ĉiajn bazajn teknikajn kaj ekonomiajn funkciojn koneksajn kun la akvo.

Por la akvo-ekonomio de la nuntempo prezentas sin la imperativa pretendo: tiamaniere ĝi intervenu en la vivon de la akvoj, ke tiu aktivado respondu al la postuloj de la socia-ekonomia evoluo, kontribuu al la laŭplana kaj proporcia evoluo de la popol-ekonomio kaj samtempe estu en akordo kun la postuloj protekti la naturan medion kaj defendi la akvo-trezoron.

La celkonscia, laŭplana interveno en la vivon de la akvoj — paralele kun la evoluo de la scienco kaj tekniko — estas efektivigebla sur ĉiam pli alta nivelo. Tion klarigas, ke la teknika scienca progreso unuflanke ĉiam pli larĝigas la eblecojn por ekkoni la naturajn fenomenojn koneksajn kun la akvo, aliflanke ĝi disponigas al ni evoluintajn ilojn kaj procedojn lige kun akvo-konstruado, akvo-mekaniko, kemio, teknologio, inĝenierado kaj biologio. Helpe de tiuj iloj kaj procedoj ni povas reguligi la enfluo-kondiĉojn de la surfacaj akvoj, eĉ la fluorilatojn de la subgrundaj akvoj kaj transformi iliajn materiajn ecojn. Ni povas ekspluati la akvo-trezoron kaŝantan sin en la profundo de la tero kaj ni povas ankaŭ „fabriki" uzeblan akvon el la kvalite malboniĝinta akvo-provizo.

La teknika progreso ebligas ankaŭ la influadon de la ekvilibro inter la akvo-provizo kaj bezonoj, flanke de la akvo-pretendoj, ja ni povas atingi eksterordinare gravajn rezultojn per apliko de akvo-ŝpara fabrikada teknologio, per ripetita utiligo de la akvo kaj per reduktado de la en-reta akvo-perdo.

Post la trakto de la supre diritaj ŝajnas laŭcele superrigardi temo post temo la pli gravajn teknikajn-ekonomiajn karakterizojn de la moderna akvo-ekonomio.

La pli gravaj teknikaj-ekonomiaj karakterizoj de la moderna akvo-ekonomio

La pli gravaj teknikaj-ekonomiaj karakterizoj de la moderna akvo-ekonomio estas sumigeblaj laŭ la ĉi-sekvantaj:

— Sekve de sia strikta interrilato kun la naturo, la akvo-ekonomiaj intervenoj daŭre aliformas la homan medion kaj ilia efiko ofte estas nereturnebla. (Jen la fakto, kiu motivas interalie, ke rilate la akvo-ekonomion estas necese antaŭen-rigardi ne nur al meza kaj longa tempo-daŭroj, sed ankaŭ al la malproksima estonteco, esplorante en foraj perspektivoj la efikon kaj disringiĝon* de la serio de la planitaj intervenoj.)

— La akvo-ekonomio — per sia multefaceta teknika aktivado — produktas la akvon, anstataŭ rekte ekposedi ĝin. Per celkonscia influo sur la naturan cirkuladon ĝi povas aliformi la lokan kaj tempan distribuojn de la naturaj provizoj.

— La akvo-ekonomio mastrumas provizojn ne statikajn, sed dinamikajn, estantajn en natura cirkulado. Ĝia krudmaterialo, la akvo, ne ĉesas havi interrilaton kun la naturo ankaŭ post la ekspluato kaj utiligo, ĉar la akvo denove reiras en la cirkuladon de la naturo.

— La efikoj de la akvo-ekonomia aktivado — pro ilia fundamento-dona karaktero — estas ĝenerale longdistancaj, pro tio ili bezonas decidojn bazitajn sur multeflankaj analizoj kaj fidindaj prognozoj.

---

* *disringiĝo: sur akvo-spegulo diskurantaj ondetoj en formo de multaj koncentraj ringoj, kiam ekz. ŝtoneto falas en la akvon. (Ĉi tie en metafora senco.)*

Detalo de la panoramo de Balatono ĉe urbo Siófok

— La ekipaĵoj de la akvo-ekonomio havas relative longan teknikan-ekonomian vivodaŭron kaj la dediĉita tempo por la realigo de la investadoj estas pli granda ol averaĝe. Jen la kaŭzo, ke ĉe la fiksado de la mezuroj por la kapacito de la teknikaj estigaĵoj oni devas atenti ne la kontentigon de la pretendoj, aperantaj dum la projektado, nek la pretendojn prezentiĝantajn tempe de la ekfunkciigo, sed oni devas superrigardi evoluon antaŭvideblan en esence pli granda tempo-horizonto (tiel ekz. ĉe akvo-provizado 15—20 jarojn, ĉe inundo-ŝirmaj konstruaĵoj 50—80 jarojn). Pro la malrapida amortizo de la iloj kaj pro tio, ke la ekspluatado de la kapacito povas realiĝi nur dum pli longa tempo, ĉi tie oni ne povas apliki ĉiu-vidpunkte la ĝeneralan sencon de la principo pri „repagiĝo de la investoj", ĉar ĉi tie ĝi signifas forte diverĝajn postulaĵojn.

— La akvo-ekonomiaj aktivadoj estas en vasta interefiko kun la teritoria lokiĝo de la produktofortoj kaj pretendas vidmanieron etendiĝantan sur vastaj spacoj.

Krome la multeflankaj aktivadoj interkroĉiĝas laŭ spaco kaj funkcio, inter ili manifestiĝas strikta teknika interligo. Ekz. strikta interligo estas inter la akvo-utiligo kaj la ŝirmado kontraŭ akvo-damaĝoj, kvankam pro siaj efikoj ili ŝajnas esti kontraŭaj.

— Kun preskaŭ ĉiuj siaj aktivadoj kaj kreaĵoj la akvo-ekonomio ligiĝas al natur-kondiĉoj, al klimataj kaj hidrologiaj rilatoj. Pro tio ilia efiko en tiu ĉi branĉo estas multe pli emfazita ol alie. Sekve de ĝia strikta interrilato kun la naturaj faktoroj la spacaj interligoj de la akvo-ekonomio estas en strikta interefiko sur granda teritorio unu kun la alia eĉ trans la landlimo.

— Al la efektivigo de diversaj akvo-ekonomiaj aktivadoj — ĉu temas pri la ekstrakto de la akvo el la naturo kaj ĝia preparo por utiligo, ĉu temas pri ŝirmado kontraŭ akvo-damaĝoj — estas necesaj signife multe da materialo, iloj kaj laboro. Kompare do kun aliaj popol-ekonomiaj branĉoj la bezono de la akvo-ekonomio pri materialo kaj iloj estas eksterordinare granda.

— La akvo, kiel produkto de diversaj labor-procedoj de la akvo-ekonomio (kiel ekz. malkovro de akvo-provizoj, ekspluato de la akvo, ĝiaj porkvalita preparlaboro, transporto, distribuo, purigo de la policiitaj akvoj, reguligo de la defluaj cirkonstancoj ktp.) havas valoron, kiun difinas — laŭ la Marx-a valor-teorio — la kvanto de la laboro de la socio, laboro necesa al ĝia reproduktado. La valoro de la laboro egalas do la kvanton de la homa kaj maŝina laboroj uzitaj por ĝia produktado.

— La elspezoj de la akvo-ekonomio estas nombre mezureblaj, sed nur parto de ĝiaj rezultoj estas rekte juĝeblaj, ilia signifa parto aperas nur malrekte, en sia ekonomia efiko atingita kune kun aliaj faktoroj.

Por kontentigi la rapidritme kreskantan akvo-bezonon oni devos plenumi multe da labor- kaj material-pretendajn konstruadojn. Tiuj estos realigeblaj nur surbaze de planoj sufiĉe antaŭvidantaj. Tio ŝarĝas la akvo-aferajn fakulojn per eksterordinare granda respondeco. Ili konscias pri tio, kaj klopodas plenumi sian laboron konforme al sia profesio, neniam preteratentante, ke la vivon de la estonta homo grandmezure influas la antaŭvido de la hodiaŭa homo.

Trad.: Tibor *Ujlaky-Nagy*

JULIUS BALBIN

„Zamenhof-strato estis unu el la kelkaj stratoj en la getto de Varsovio, tra kiuj miloj da judoj estis forkondukataj tago-post-tago al sia fina destino en la naziaj ekstermejoj."

Jan Galewicz: „Mi estis en Treblinka", p. 116.

LA VORTO

Al Gaston Waringhien
Mi estas vorto
Mi delonge staras jam
antaŭ la pordo
de viaj amasiĝintaj
trezoroj.
Tridek jaroj ĵus forpasis
de kiam komenciĝis
mia vana atendado.
Mi memoras la tempon
kiam vi estis modesta
vortaro — preskaŭ poŝvortareto
kvankam vi jam nomiĝis „plena"
Jes, vi kreskis tre rapide
en la lastaj jardekoj
kaj nun vi jam estas
ne nur tute matura
sed ankaŭ vere abunda kaj riĉa.

Sed mi ankoraŭ ĉiam
devas atendi kaj atendi,
starante antaŭ via
fermita pordo,
kvazaŭ plorpetanta almozulo
veninta el fremda malproksimo.
Mi staras ekstere,
en frida nokto,
sur malvarmiĝintaj cindroj,
kiujn vento disŝutas
antaŭ via multekosta sojlo.

Jes, vi iĝis korpulenta —
memstara, memsufiĉa,
eĉ luksa leksikono.
Via valoro ege altiĝis —
kaj vi ŝanĝis la nomon.
Vi nun nomiĝas „plena ilustrita"
kaj fiere najbaras kun vortaroj
de potencaj grandlingvoj.

Dume mi daŭre atendas.
Sed ĝis nun neniu
invitis min eniri.
Mi ne volas trudi min
kontraŭ ies ajn volo.
Tamen estas nekompreneble,
ke mia ekzisto tiel okulfrapa
ankoraŭ ne estis rimarkita.
Tamen mi ne ĉesos atendi
obstine, pacience kaj kviete
ĝis iu re-aligos min
al mia frataro.
Jes, frataro!
Ĉar ni apartenas
al la sama familio.
Ĉu vi ne vidas kiel proksimas
nia sanga parenceco?
Mi tute ne estas
pli fremda al vi
ol genocido,
kiu jam delonge
eniris vian rondon.

Ĉu mi aspektas pli strange?
Ĉu mia eksteraĵo
estas pli malagrabla,
pli forpuŝa?
Jes, mi scias,
ke mi malbonodoras
per la fetoro
de bruligitaj kadavroj.
Mi ĉeestis ĉiun masakregon,
ĉiun amasbuĉadon
de milionoj da senkulpuloj
en nia malhumana epoko.
Mi estis en la judaj gettoj
de Pollando, en la gasĉambroj
de Aŭschwitz kaj de Treblinka,
de Majdanek kaj de Sobibor.
Mi akompanis naziajn hordojn
en la orienta Eŭropo
kaj vidis centmilojn
da rusaj soldatoj
mortigataj per malsatego
en militkaptitejoj.
Mi estis en bombbruligata
Dresden.
Mi estis en la atominferoj
de Hiroshima
kaj de Nagasaki.

Mi scias,
kion multaj diros pri mi.
Jen alia superflua
neologismo!
Sed vi, miaj fratoj,
certe konscias
kiel ili eraros.
Laŭdevene mi ja estas
unu el la pravortoj
preterviditaj nur provizore . . .
Samkiel tiom de vi,
mi naskiĝis
en la antikva greka
kaj estis adoptita
de la latina kaj ties idolingvoj.
En nia epoko
mi iĝis nemalhavebla
en la angla kaj aliaj idiomoj,
ĉar mia signifo
severe kaj sinistre
plilarĝiĝis.
Mi iĝis
neanstataŭigebla.
„Genocido" povus esti
tradukita per „popolmurdo".
Sed neniu kunmetaĵo
kapablus redoni
mian unikan kaj profundan
sencon.

Mi ankaŭ scias,
ke la plej multo de viaj uzantoj
estas nekuraceblaj optimistoj.
Verŝajne ili pensas,
ke mi iom-post-iom
malaktualiĝas.
Bedaŭrinde, ili metis
siajn kapojn
en la verdan sablon
kaj rifuzis vidi
kio dum la ĵus forpasintaj jaroj
okazadis en Sud-Orienta Azio,
kie mi estis plurfoje vokita.
Mi absolute certas,
ke Zamenhof,
via grandanima iniciatinto,
neniam permesus,
ke ekzistu kontraŭ mi
ia baro.

Mi estas holokaŭsto.
Ho, dolora mia sorto:
Sed almenaŭ viaj poetoj memoru
ke jam troviĝas,
en ĉi luksa, abunda kaj riĉa
vortaro,
utila kaj taŭga rimvorto:
Faŭsto.

Novojorko, 1975.

GLOSOJ

holokaŭsto
brulofero; (larĝasence, ekde la Dua Mondmilito) genocida amasmurdo, precipe perfajre.

Aŭschwitz, Treblinka, Majdanek, Sobibor
la plej grandaj el la naziaj amasmortigejoj en Pollando.

Faŭsto
laŭ germana legendo, magiisto, alĥemiisto kaj astrologo kiu vendis sian animon al diablo intersanĝe por scio kaj potenco.

Novjara Mesaĝo 1976

HUMPHREY TONKIN prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Kiam la nuna Estraro de UEA elektiĝis en aŭgusto 1974, inkluzivita inter ĝiaj anoj estis tre respektata kaj ŝatata figuro de la Esperanto-movado, prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio d-ro Pol Denoël. Laŭ profesio li estas kuracisto. Jen, ni diris, kuracisto kies ĉefa laboro por UEA estos reunuigi kaj refortigi nian Asocion. Kaj ĝuste tiun taskon ni konfidis al li. Ke d-ro Denoel sukcesis en tiu tasko, atestis interalie la bona kaj laborplena etoso de la 60-a Universala Kongreso en Kopenhago. Ĝin atestas ankaŭ la entuziasmo kaj saĝeco per kiuj nuntempe laboras multaj el niaj landaj kaj fakaj asocioj, kaj la novaj iniciatoj kiuj okazas tra diversaj sektoroj de la Asocio.

Kvankam la prezidanto mem ne estas la plej senpartia juĝanto, ŝajnas, ke la Universala Kongreso atestis interalie la bona kaj laborplena etoso de la UEA reformis siajn internajn labormetodojn, fortigante siajn diversajn komisionojn kaj akceptante novajn procedurajn regulojn; ĝi decidis pri pluraj novaj paŝoj sur la kampoj de administrado (interalie renovigo de la kotiza sistemo) kaj de eksteraj rilatoj; ĝi rekonfirmis la politikan neŭtralecon de la Asocio; ĝi sendis rezolucion al la Eŭropa Sekureca Konferenco; kaj, eble plej grave, ĝi aŭdis pri la restabiliĝo de la financoj de la Asocio kaj principe akceptis novan kaj ambician programon por financa plifortigo. Ĉi-lasta, kiu nomiĝos la Financa Programo de la Esperanto-Movado, tuŝos ne nur UEA, sed ĉiujn asociojn, kiuj rilatas kun ĝi. Ĝia ĉefa celo estas allogi per kunordigita kaj sistema agado financajn kontribuojn el ekster la rondoj de la Esperanto-movado.

La kongreso ankaŭ spertis plifortiĝon de la rilatoj inter fakaj asocioj kaj inter landaj asocioj, ĝiaj kunsidoj pri la Internacia Jaro de la Virino notinde sukcesis, bona teatra prezento kaj impona kunsido de la Belatraj Konkursoj faris sian kontribuon, kaj pluraj novaj eroj aŭ formoj en la programo estis klare sukcesaj. Ankaŭ la kongreso (pere de la Komitato) rekonis justan kaj dignan rilaton al la historio mem de nia Afero, nomante sep veteranojn de la Esperanto-movado Honoraj Membroj de UEA.

Verŝajne d-ro Denoël hodiaŭ diagnozus, ke la Asocio estas sur bona vojo al kompleta saniĝo. Sed restas la demando ĉu tiu resaniĝo fariĝos daŭra, firma kaj konstanta. Kaj kiel transformi la foje durajn lecionojn de la pasinteco en la sukcesojn de morgaŭ? Ni havas certan senton pri ni mem, heredaĵon de multaj jaroj da laboro por Esperanto, kiu enhavas multajn bonajn ecojn sed eble bezonas modifon. Ni emas supozi, ke le fortoj de la Esperanto-movado estas tre limigitaj. En certaj sencoj tiu supozo estas kompreneble tute prava: niaj rimedoj ne estas senlimaj kaj ni ne povas ĉion. Sed en aliaj sencoj ĝi estas profunde erara. Kultura movado kiel la nia, kiu kalkulas inter si centmilojn da aktivuloj kaj simpatiantoj, malantaŭ kiu staras longa, klera kaj impona historio, havas fortojn kaj potencialojn grandegajn. La sukceso de Esperanto venos kiam ni trovos la vojon al plena utiligo de ĉiuj tiuj fortoj je nia dispono, kiam ĉiu homo kontribuos libervole kaj ĝis maksimumo, kaj kiam ni igos nian historion labori por nia estonteco.

Tiu maksimuma strebo por nia idealo — la idealo de komuna internacia lingvo por ĉiuj homoj — kuŝas interne de niaj kapabloj, sed ni ankoraŭ ne plene realigas ĝin. Persone mi opinias, ke ĝi estos realigebla ne per devigo, ne per internaj kvereloj pri neesencaj demandoj, sed per toleremo, komprenemo, reciproka respekto, kaj (ĉefe) sinceraj klopodoj trovi komunan grundon kaj difini klare niajn prioritatojn. Tiu estis la vojo de Zamenhof, eĉ se la historio foje alportis siajn renversojn. Tiu estu la vojo de ni, posteuloj de Zamenhof, en pli skeptika sed ne nepre pli saĝa mondo.

La spirito de Kopenhago jam montris, ke la vojo de komprenemo kondukas al konkretaj kaj pozitivaj rezultoj. Interalie ĝi permesas al ni koncentri niajn fortojn je la ĉefa tasko. Surbaze de tiu spirito venis nova esprimiĝo, flanke de niaj membroj, de konfido kaj laborpreteco. Tio speguliĝas en la bona reago al la nova Volontula Servo, en la konto de donacoj (kiu atingis rekordan nivelon en 1975), en la Societo Zamenhof, en la Financa Programo, en la laboro de la landaj asocioj. Nun necesas ĝuste etendi niajn limojn: kapti la atenton kaj simpation de la publiko, gajni la subtenon de instancoj kaj organizoj, instrui la lingvon, saĝe informadi pri ĝi, evoluigi kaj pristudi nian movadon kaj nian medion. Gravaj taskoj — sed indaj kaj realigeblaj.

Kio validas por UEA memkompreneble validas por ĉiuj flankoj de nia vasta kaj vivoplena movado. UEA ne laboras en vakuo, ne laboras en izolo. La laboro de la diversaj fakaj asocioj, la laboro de la neneŭtralaj organizoj, la eldona agado, la radio, la diligenta aktivado de amaso da instruistoj kaj lokaj organizantoj — ĉio ĉi ankaŭ floros en atmosfero de toleremo kaj celkonscio. Kaj kun ĉiuj flankoj de nia movado UEA deziras kunlabori por la komuna bono. Sur la sojlo de 1976, la Estraro de UEA kaj ĉiuj labororganoj de la Asocio salutas ne nur la membrojn de la Asocio sed ĉiujn parolantojn de la Internacia Lingvo. Por la jaro 1976 UEA havas ambiciajn planojn, inter kiuj la 61-a Universala Kongreso en Ateno estos nur la plej festa kaj plej krona elemento. Ni invitas al la tuta esperantistaro partopreni nian agadon, plene ĝui la propran esperantistecon, kaj serioze entrepreni tiun nian kulturan respondecon, disvastigi kaj evoluigi nian lingvon. La jaro 1976 alportu sukceson, pacon, prosperon, kaj — sanon — al ni ĉiuj.

RECENZOJ

ETNOGRAFIAJ DONITAĴOJ
350 p., 13x19 cm, broŝ. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo — 1974.

„La nuna broŝuro celas konigi al niaj legantoj iun aspekton de l' resto, malmulte konata, sed ekstreme grava de nia nacia vivo; tiuj etnografiaj donitaĵoj helpos pli bone kompreni nian socialisman revolucion entreprenatan en la kadro de multnacia lando."

Tiu ĉi citaĵo el la antaŭparolo de *Etnografiaj* donitaĵoj plej koncize resumas la destinon de verko, kiun — kvankam skize — ni volonte prezentos al niaj legantoj.

Apenaŭ silentiĝis la detrua milito en la multesuferanta, sanganta tero de Vjetnamio, kaj estis freŝa la subskribo de la Pariza packontrakto, kiam la Fremdlingva Eldonejo en Hanojo — en 1973 — komencis eldoni serion de „La naciaj malplimultoj en VDR". La nuna verko entenas studojn pri etnaj grupoj, kiuj loĝas en Nord-Okcidento kaj Oriento de VDR: Muong-anoj, Thai-anoj, Meo-anoj, Khmu-anoj, krome kvin triboj ĝustatempe forsavitaj el ekstermiĝo.

La aŭtoroj — Nguyen Tu Chi, Dang Nghiem Van, Lam Tam, Dang Nghiem Yan — kun scienca pretendo esploris la etnajn grupojn, kies lingvo, kulturo, moralo kaj tradicioj multe diversas unu de alia, influata ankaŭ de geografiaj situacioj, kie ili vivas. Sekve, la studoj prezentas ankaŭ la pejzaĝon, kvazaŭ ĝuiga vojpriskribo. Helpe de la libro oni povas iom pli funde ekkoni la popolon, kiu dum longaj jaroj estis suferanta ĉefrolanto de la milito. La volumon kompletigas mapo pri geografia distribuo de diversaj etnaj grupoj. Kvankam la vivmaniero de tiuj komunumoj montras ekstreman diversecon, tamen ili estas firme kunligitaj ne nur per historiaj ligiloj, sed unuigas ilin ankaŭ la komuna celo: krei florantan vivon por ĉiu popolo de Vjetnamio.

Bedaŭrinde per kelkaj linioj ne eblas doni eĉ gustumaĵon el la libro, kiun ni bonkore rekomendas al niaj legantoj.

A. *Csiszár*

Zora Heide: NI, HOMOJ . . . Originalaj noveloj. Eld.: Dansk Esperanto—Forlag, Abyhj, 1970. 72 p., 14x20 cm. Prezo: ned. gld. 4,92.

Zora Heide per tiu ĉi malgranda kolekto fariĝis unu el la malmultaj belaj promesoj de nia originala prozo, kaj ni esperu, ke ni ne longe kaj ne vane atendos la promesplenuman daŭrigon.

Ŝi estas jugoslavino, edziĝinta al dana esperantisto kaj vivanta en Danlando ekde 1960, tamen, en ŝiaj rakontoj aperas la hejma pejzaĝo, kaj precipe la hejmaj homoj. La volumeto enhavas ses rakontojn; ilia historio senescepte disvolviĝas en dalmataj vilaĝoj, kies atmosfero videble estas tre familiara al la aŭtorino. Tamen, tute ne temas pri kutima folkloraĵo, Zora Heide ne kontentiĝas pri la surfaco: ŝin interesas la homo mem, kaj kvankam preskaŭ ĉiuj ŝiaj figuroj estas vilaĝanoj, tamen ili estas enkorpigantoj de ecoj universale homaj. Zora Heide ne nur bone konas, sed ankaŭ amas siajn figurojn, kaj ĝuste tiu amo vivigas kaj varmigas ĉiujn ŝiajn frazojn, ĝi estas kvazaŭ la motoro de ŝia rakonta talento.

Ŝi ne verkas pri eventoj eksterordinaraj, oni ne atendu spirhaltigajn surprizojn, tamen ne temas pri enuigaj, plataj ĝeneralaĵoj. La kerno de ĉiuj rakontoj estas prezento de iu tipe homa eco, sed ĉiam ŝi trovas kredindan kaj ĝuindan historion por kredenci siajn pensojn en decaj rakontaj vestoj. Do, la plej malforta flanko de niaj originalaj prozaj verkoj — la harmonio de unikeco kaj tipeco — ĉi tie estas bonŝance solvita.

La stilo de ŝiaj rakontoj estas flua, eleganta, kvankam foj-foje iom griza. Oni vole-nevole pensas pri la stilo de niaj nordaj verkistoj (Engholm, Adamson ktp.) kaj demandas sin: ĉu la nordlanda vivado tiagrade sobrigis ŝin, aŭ eble ŝia iom tro objektiva stilo fontas el denaska karaktero? Ĉiukaze, tiu objektivemo ne estas plene negativa fenomeno — ĝi inspiras al la aŭtorino tre disciplineman prezentmanieron, kiu rekompencas la leganton por la forrestintaj pli fortaj stilefikoj.

Resume: la legontoj de la novelaro Ni, homoj . . . dediĉos sian tempon por legi ses originalajn rakontojn, el kiuj minimume unu — Avo Martin — certe eniros la oran libron de la esperanta novelarto.

Bertram Potts: Nokto da timo. Originalaj noveloj. Eld.: Dansk Esperanto—Forlag. 80 p., 21x14 cm. Abyhj, 1971. Kartonita. Prezo: 5,— ned. gld.

Bertram Potts, filo de la malproksima lando Nov-Zelando, estas novulo en la esperanta literaturo, kvankam laŭ la kalendaro li tute ne apartenas al la flavbekuloj: li naskiĝis en la jaro 1895 en Britujo. Kiel 16-jara junulo en 1911 li transloĝiĝis al Nov-Zelando, kaj tie li lernis Esperanton en 1912.

La tri noveloj, kiujn enhavas la allog-aspekta volumo — apartajn gratulojn al la desegninto de la kovrilpaĝo, C. Farrant — montras al la leganto tri vizaĝojn de Potts. Tiu varieco pruvas,

ke tiu ĉi libro tute ne estas ia sumaĵo de la vivspertoj de maljunulo, sed produkto de vera verkisto, kiu scias bone sian metion, kaj kapablas ludi per pluraj instrumentoj.

Sendube, la plej memorinda peco el la tri estas la titoldona *Nokto da timo*. La historio estas simpla, tamen ne ĉiutaga. Meteorologo, nomata Partridge, en la arkta regiono postvivas katastrofon de sia ekspedicio, kaj trovas azilon en la kabano de stranga peltkolektisto, Braggs, kiu estas fervora ŝatanto de la ŝakludo. Partridge ne ŝatas la ŝakon, sed lia gastiganto ĉiam trudas al li ludi. La streĉiteco de la atmosfero en la kabano konstante kreskas: la meteorologo ofte ludas nur por eviti interbatiĝon, sed iom post iom li perfektiĝas en la ŝakarto, kaj . . . Potts kapablas krei fajrerantan atmosferon per stilo ekvilibrita, simpla, preskaŭ griza.

La dua novelo, Ĉerizo-torto, sonigas kordojn tute alispecajn. La historio ankaŭ ĉi tie estas simpla, la stilo ekvilibrita, kaj surprizo atendas la leganton nur ĉe la fino. Redman, la ĝisosta fraŭlo, ne povas kontraŭstari la gastronomian arton de la ĉarma vidvino Tonkins, kaj post multaj miskomprenoj kaj hezitado atendas ilin oraŭtuna feliĉo.

La tria novelo, La poemo-maŝino estas surpriza fantaziaĵo pri la poetino Marjorie Boulton. Ŝi komisias al la aŭtoro inventi poemo-maŝinon por tiel kreskigi siajn tantiemojn, ricevatajn por esperantaj poemoj. La kuriozeco de la ideo — vivi lukse per tantiemoj de esperantaj poemoj! — kreas gajan atmosferon, kaj la leganto ne perdas la bonhumoron eĉ tiam, kiam klariĝas, ke la tuta historio estis nur sonĝo.

Potts apartenas al tia kategorio de la esperantaj verkistoj, el kiu speco ni bezonus almenaŭ dekon por legigi nian publikon. Li ne celas krei ĉefverkojn, kaj dank' al tio la spasmo de la ambicio neniam rigidigas lian plumon. Li rakontas historiojn bonhumore, plezurige, per stilo simpla, ĉiutaga, tamen ĉiam elvokiva — unuvorte: literatura. Mankas grandaj ideoj pri filozofiaj demandoj, li kontentiĝas per la surpapera eternigo de la perloj de la simplaj tagoj; liaj figuroj neniam estas potencaj simboloj, sed ĉiam vivuloj kun realaj, tipaj homaj ecoj. Kaj tiel la bonkvalita literaturo samtempe estas ankaŭ agrabla legaĵo.

MIYAMOTO Masao: Historieto de la japana Esperanto-movado. Dua eldono. Eld.: Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj, Oosaka, 1975. 116 p., 19x17 cm. Prezo: 7,— ned. gld.

La mondo ne konsistas nur el Eŭropo kaj Norda Ameriko — jen vero, kiun la homaro devus jam lerni antaŭ longa tempo. Tiu ĉi vero validas ankaŭ por ni, esperantistoj, kaj tiom pli dolore estas por ni konstati, ke nia movado praktike limiĝas nur al la supraj du kontinentoj. La sola escepto estas Japanujo, kaj ne estas troigo aserti, ke la vojo de Esperanto tie postulas kaj meritas specialan atenton de la internacia movado.

La multflanka agado de la japanaj esperantistoj estas konata al ni: la multnombraj, bonege redaktitaj kaj tradukitaj libroj, kiuj konstante fluas el la lando de la leviĝanta suno, la amasaj korespondanoncetoj en la esperanta gazetaro, kaj la ĉiam pli multnombra partopreno de japanoj en la internaciaj esperantistaj aranĝoj projekciis antaŭ ni la konturojn de signifa landa movado. Tamen, sistema trarigardo pri la rezultoj kaj malsukcesoj ĝis nun mankis.

Tiu ĉi bone redaktita, vortŝpare konceptita libro de Miyamoto enhavas amason da konindaj okazaĵoj kaj datoj. Li prezentas la Japanujan vojon de Esperanto ekde la komenco — la „mitologia epoko", kiel li mem ĝin titolas — ĝis la nunaj tagoj.

Ni ekscias, ke Esperanton „importis" en Japanujon la maldekstruloj, kaj la movado por la Internacia Lingvo dum longa tempo disvolviĝis paralele kun la maldekstraj movadoj: ekz. Sakai Tosihiko, la unua prezidanto de la Japana Komunista Partio estis samtempe unu el la pioniroj de la japana Esperanto-movado.

Mankas ĉi tie loko por ĉiuj interesaj novaĵoj, kiujn prezentas la libro, tamen, estas nepre menciinde, ke en 1929 la dramo de A. Tolstoj: La Morto de Danton estis tradukita el Esperanto al la japana lingvo kaj eĉ prezentita sur scenejo. Kaj dum la lasta jardeko estis eldonitaj en la japana lingvo, tradukitaj el Esperanto, multaj eldonaĵoj de la Fremdlingva Eldonejo en Hanojo: Franjo Tu Haŭ, Meze de Flamoj, Senelirejo, La lasta altaĵo kaj La bambufluto. Kun iom da memkritiko: kiu landa asocio en la socialismaj landoj povas fieri pri simila rezulto?

Miyamoto tamen ne nur vicigas la eventojn, li aliras sian temon aplikante striktajn kriteriojn socisciencajn. Kaj li ne limigas sin nur al pozitivaĵoj — li prezentas ankaŭ la organizajn kaj politikajn erarojn, faritajn de la japana movado. Tiel ni ekscias pri la t.n. Esperantista Patriota Unio, kiu apogis la „sanktan militon" de la japana faŝismo. Elleginte tiun ĉi libron, mi komencis forte envii sciantojn de la japana lingvo, kiuj povas legi ankaŭ la 355-paĝan japanlingvan verkon de Miyamoto, „Historio de la kontraŭreĝima Esperanto-movado".

Resume: Historieto de la Japana Esperanto-Movado estas libro, kiu tute ne koncernas nur japanojn — ĝi enhavas amason da konindaj faktoj kaj utiligendaj spertoj ankaŭ por esperantistoj en aliaj landoj.

V. *Benczik*

Leterkesto

Kolektiĝas jam la opinioj pri la 3-a kaj 4-a numeroj de Hungara Vivo. Kelkaj el la leteroj — kiel kutime — traktas ĝian enhavon kaj ĝeneralan aspekton, pleje laŭdante — ankaŭ kiel kutime; aliaj tuŝas nur kelkajn artikolojn. Ĉi-lastaj estas pli interesaj, ĉar ili montras, ke la legantoj ne nur trafoliumas la revuon, sed ĝi instigas ilin al pensado, cerbumado.

Longan, foj-foje eĉ pasian »cerbumadon« sendis Walter ZELAZNY el Pollando. Li skribas: »Mi ne volas fari referaĵon pri la rolo de gazetaro en la mondo«... Malgraŭ la intencoj, la letero fariĝis kvazaŭ referaĵo, enhavanta plurajn gravajn, eĉ tute novajn pensojn. Ĉiujn, bedaŭrinde, ne eblas citi. Do, la esenco:

„Diskutado pri esperanta gazetaro en Esperantujo, aperinta en HV 3/75 pruvas, ke ankoraŭ dormetas en esperantaj kapoj idealisma vidpunkto pri nia afero... Devus ekzisti iu E-a revuo, aperanta en ĉ. 30 000 ekzempleroj, por la tutmonda esperantistaro. Por ke tia revuo aperu, necesas, ke ĝi havu ŝtatan reton de distribuo. Tiam ĝi aperus en iu socialisma lando, ĉar tiel preskaŭ ĉiuj mondanoj povus ĝin aboni. Ĝi ne povus havi la karakteron de ŝtata eldonaĵo, tamen devus respekti kutimojn kaj politikon de tiu lando. Tiu revuo aperus sub aŭspicio de UEA, kaj havus ĉefe kulturan karakteron. Ĝi interesiĝus pri literaturo, poezio, filmarto, sociologio, pri gravaj internaciaj eventoj servantaj al la paco kaj sekureco. Havante tiun eldonkvanton, ĝi povus servi ankaŭ parte kiel reklamilo por entreprenoj. Ĝi povus aperi monate aŭ duonmonate, kaj povus esti vera spegulo de Esperantujo kaj de la mondo...

Se ni ne sukcesas aperigi revuon por la monda esperantistaro, ni faru almenaŭ intersocialisman revuon por ĉiuj, sendepende de la politikaj konvinkoj kaj mondkoncepto de la legantoj.

... Je la fino mi volas proponi al HV, ke ĝi celu fariĝi tiu revuo por monda esperantistaro, aŭ almenaŭ por tiu socialisma. Ŝajnas al mi, ke nenion ĝi devas ŝanĝi krom la titolo, ekz. je „Socialisma revuo" aŭ io simila. Kaj oni devas konvinki la estraranojn de L. A., ke valoras aperigi tiun revuon. Ĉu ne eblas, ĉu vere ne eblas?

... Mi volas havi prefere du bonajn ol 100 ridindajn revuojn... Aperu aliaj E-aj revuoj, sed ĉefe nacilingve, kiel varbiloj al potencialaj esperantistoj."

Do, vere interesaj, sed iomete futurologiaj pensoj. La redaktoraro de HV estos kontenta, se dum longa tempo povos subteni kaj paŝo post paŝo evoluigi la nunan enhavan kaj artan nivelon de la revuo, anstataŭ ŝanĝi ĝin en alian revuon. Nun ni lasu la futuron, kaj prenu la leteron de sveda Bertil ENGLUND:

„Kiel muzikisto, mi kun speciala intereso legis la artikolon »Vivo por Bartók«. Nuntempe, kiam la juna generacio pli kaj pli grandnombre interesiĝas pri popolmuziko — ĝojinda fakto —, ni devas dankeme rememori kaj pritaksi la gigantan laboron, kiun Bartók faris por kolekti kaj rearanĝi la diversnaciajn popolmelodiojn, kaj por prezenti ilin ankaŭ al la koncertvizitantoj. Neniu koncertmuzikisto superis ĝis nun Bartók-on sur tiu kampo. La muzikemaj legantoj de HV do ĝoju, ke s-ro Lesznai per tia kompetento kontribuas al ĉiu numero. Hungario estas ja tre altranga muziklando."

Ne nur la muzikemaj, sed ankaŭ la literaturemaj legantoj estis kontentigitaj per nia Jókai-numero, precipe per la traduko de la rakonto „La aĥemenidiono". Iu DANKEMA LEGANTO el Leningrado — la nomo estas nelegebla — sendis al ni poemon titolitan: „Mi — guto". Li skribas:

„... Mi tradukis ĝin post la tralego de la vortoj en la rakonto: ... sia koro jam havis nur unu guton de forto. Sed tiu guto ankoraŭ rezistis en la koro, ĝi ankoraŭ batalis..."

Kalendaro

1946—02—01 Antaŭ 30 jaroj oni proklamis Hungarion Respubliko.

1856—02—04 Antaŭ 120 jaroj naskiĝis d-ro Sándor GIESSWEIN, hungara papa prelato. Li kiel deputito grave helpis la hungaran E-movadon en la Parlamento. (Vidu HV. 62/3.)

1881—02—09 Antaŭ 95 jaroj mortis F. M. DOSTOJEVSKI, elstara rusa verkisto.

1951—02—19 Antaŭ 25 jaroj mortis André GIDE, franca Nobel-premiita verkisto.

1891—02—23 Antaŭ 85 jaroj naskiĝis Georgo DEŜKIN, rusa E-verkisto. Liajn verkojn distingas tre delikata lirismo, flua kaj eleganta stilo, simpleco, sincereco kaj melodio.

1896—02—25 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Jan van SCHOOR, belga E-verkisto. Li kunlaboris por „Belga Antologio" kaj en la jaro 1928 eldonis siajn originalajn E-poemojn sub la titolo „Amo kaj poezio".

1906—03—01 Antaŭ 70 jaroj mortis Mihály ZICHY, hungara pentristo, grafikisto kaj ilustranto. Kun liaj ilustraĵoj aperis la unua E-eldono de „Tragedio de l'Homo" en la jaro 1924.

1876—03—02 Antaŭ 100 jaroj naskiĝis René LEMAIRE, franca esperantisto, grava persono de la franca E-movado dum la unua periodo, kunbatalanto de L. de Beaufront.

1906—03—03 Antaŭ 70 jaroj naskiĝis Achille MOTTEAU, franca esperantisto, tradukinto de „La Ventego" de Shakespeare.

1906—03—07 Antaŭ 70 jaroj naskiĝis Ladislao SPIERER-SOMLAI, hungara E-tradukisto, kunlaboranto de „Hungara Antologio" kaj de nia „Hungara Vivo".

1956—03—17 Antaŭ 20 jaroj mortis Irène JOLIOT-CURIE, franca Nobel-premiita atomfizikistino.

1881—03—23 Antaŭ 95 jaroj naskiĝis Roger MARTIN DU GARD, franca verkisto. En sia romano „Familio Thibault" pro kiu li ricevis Nobel-premion, li faras mencion ankaŭ pri Esperanto kaj esperantistoj.

1881—03—25 Antaŭ 95 jaroj naskiĝis Béla BARTÓK, hungara komponisto. (Vidu HV. 61/3—4.; 64/3.; 70/4.)

1961—03—28 Antaŭ 15 jaroj aperis la unua numero de nia HUNGARA VIVO.

Komp. L. RIETH

Paĝo de FERI'

El orienta florbedo



Kenji Ossaka, la japana poeto verkis en poemo: „Ĉesu homoj ho tumulti . . ." — la daŭrigon vidu en vicoj 1. horizontala 8.; 12. kaj 57. vertikalaj. Ensendi sufiĉas nur la citaĵon ĝis la 1-a de majo. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 12. Reen: prepozicio. 13. Konjunkcio. 14. Granda urbo en Aŭstralio apud la Tasmana maro. 15. Sufikso. 16. Orienta brando (Radiko). 18. Muskolmembrana sako. 19. Ĉiu el la du flankaj partoj de la nazo. 20. Neologismo proponita de Zamenhof por signifi: supren. 21. Samaj vokaloj. 22. Reen: mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj. 23. Samspecaj literoj de: lino. 24. Granda skota poeto (Robert, 1759—96). 27. Deziras havi tion, kion alia posedas. 30. Samspecaj literoj de: rulo. 32. Hebrea virnomo. 34. Kvarpiedan seĝeton. 37. Granda afrika rabobesto. 38. Virina nomo. 39. Incitilo (R). 41. Biblia mezurunuo por greno (R). 42. Kamparo. 44. Publika parolisto (R). 46. IBK. 47. Kvociento de la reflektita lumkvanto per la ricevita, ĉe la difuze reflektantaj korpoj (R). 49. La primitiva manuskripto, kontraste kun kopio. 51. Du personaj pronomoj. 52. Sufikso. 53. Impresis la flarsenson. 55. Difinita parto de la tuto. 58. Sufikso. 59. ZAK. 61. OJ. 62. Reen: adverbo. 64. Kurba elstara nemovebla tenilo (R). 66. Danĝeran serpenton. 68. Direkti veturilon (R). 69. Komuna prepozicio. 70. Al neniu loko. 71. Nedifina adjektivo. 72. Numeralo.

VERTIKALAJ VICOJ: 2. Spirebla nesimpla gaso kiu ĉirkaŭas la teron. 3. Ŝtonego (R). 4. Prepozicio. 5. Mallonga literatura verko (R). 6. Specio de akcipitro. 7. Itala urbo en regiono Friuli. 9. Scienca prefikso = nov-. 10. LY. 11. Oleo en la angla lingvo (OIL). 17. Plurjara ligneca planto (R). 18. Granda horizontala aerfluo. 19. Rilata al scienco pri la formo kaj la strukturo de animalaj korpoj. 21. Malĝusta. 23. Mezuro de longo = 2,256 mm. 25. Numeralo. 26. Literatura stilo. 28. Ventkaptilo por antaŭenigi akvoveturilon (R). 29. Povas soni. 31. Ruza rabobesto, kun artikolo. 33. Oficiala oficisto (R). 35. Unu el la malgrandaj Antiloj, brita (sen -o finaĵo). 36. Instrumento por kunfiksi la du surfacojn de lamenoj per cilindra metala peco. 40. Sciencon pri la formoj kaj leĝoj de la pensado. 43. Centonon de la skandinavia krono. 45. Samsonecoj de la versfinoj. 48. Reen: ronda disko, turniĝanta ĉirkaŭ akso (R). 50. Vin kaj min. 54. Usona mikrobiologo, inventanto de la vakcino kontraŭ infanaparalizo (Albert Bouce 1906—). 56. Reen: bongusta trinkaĵo. 60. Subite rompigi de interna tro granda premforto (R). 63. Montru subitan gajecon. 65. Kiel 9. vico. 66. Harego (R). 67. Persona nedifinita pronomo. 68. Tia, ke ĉiuj ĝiaj organoj normale funkcias (R). 70. Persona pronomo. 71. Nedifina pronomo.

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 75/5 estas: *„Mi ridetis plormiene, kaj mi ploris ŝerce, maskon montris sole, tanem, mi konfesas verse."*

Libropremion gajnis: Hugo Löfgren el Svedio, István Puskás kaj Kálmán Szalay el Hungario.

LINGVAJ LUDOJ

Ci-numere ni prezentas novan ludon, en pluraj lingvoj jam konatan. Ĝi estas speco de vortkaŝo, sekreta skribo.

Laŭ hungara modelo ni nomas ĝin per vorto prunteprenita el teknika vortaro: INTARZIO. Tiu nomo aludas pri artaĵoj mozaike apudmetitaj de artaj meblistoj el lignaj, metalaj aŭ konkaj ornamaj elementoj; kaj ĝia esenco estas: kaŝita vorto aŭ nomo inter aliaj vortoj en kunteksto.

Por ekzemplo ni donas *intarzion* de kelkaj urbonomoj:

. . . La celo de esploro: kom*pari* zonojn de Ci*pra* golfo. Konsi*lon donos* al ni Scienca Instituto, *kio* estos bezonata . . .

Solvo: Parizo, Prago, Londono kaj Tokio.

Jen sekvas nia solvendaĵo: serĉu en la sekva teksto nomojn de dek konataj esperantistoj, elstaraj figuroj de Esperanto movado kaj literaturo.

„David resendas la leteron en la redakcion. Interalie li skribas tien pri ĉiu ĉefurba novaĵo de kultura vivo. Li jam la kvaran kinejon vizitis kaj priskribis ankaŭ plakaton kinejan. Okazis embaraso, ĉar unu el la afiŝoj prezentis kruelan tipon de plakatoj. Pri la aranĝota Oka Beletra Konkurso li mencias, ke ĝi inaŭguros mondon novan. Ĉu eble ie renkontos ni ankoraŭ la novajn talentulojn?"

Sendu al ni la dek malkaŝitajn nomojn. Ĉiu kunludanto rajtas sendi al ni similajn intarziojn, faritajn el nomoj de konataj esperantistoj. La ensendantojn de ĝustaj solvoj, kaj de trafaj novfaritaj intarzioj ni donacos, kaj la plej sukcesajn nomkaŝojn ni publikigos.

KARAJ LEGANTOJ!

Ni petas de Vi pardonon, se niaj numeroj ne ĉiam aperas ĝustatempe. Tio ne estas manko de nia laboro, okazas nur pro presejaj problemoj.

Redaktistaro

Komforto de la paneloj

Ada Csiszár — Kálmán Kalocsay: 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj — esperantaj; eldono de HEA, kartonita, sur 188 paĝoj, prezo: 75 Ft-oj, mendebla ĉe Libroservo de HEA.

Aperis do nova frazeolgia kolektaĵo, ĉi-foje dulingva, kiun pro tiu dulingveco eble kun duobla utilo kaj ĝuo povos uzi ĝiaj hungaraj aĉetantoj, tamen — laŭ la intenco de la aŭtorparo — ankaŭ la internacia legantaro trovos en ĝi lingvajn frandaĵojn interesajn kaj instru-havajn. Al la internacia komprenebleco de la libro kontribuis ankaŭ diversnaciaj kunlaborantoj kontrolintaj la esperantigitajn esprimojn.

La volumo havas la sublitolon: „Domfabriko", kiu aludas simbole al la domkonstruado: kiel la vortoj de la lingvo egalas al brikoj en la konstruado, tiel la kolektitaj ĉi-volume frazeologiaĵoj egalas al paneloj de moderna konstru-industrio.

La aŭtorparo krom proverboj kolektis ankaŭ konstantiĝintajn vortkunmetojn kaj variaĵojn de la ĉiutaga konversacia kaj oficiala lingvo, kolektis kaj esperantigis eĉ banalaĵojn kaj lingvajn bastardaĵojn, slangaĵojn. Feliĉe tiuj ne ĉiuj trairis la kribrilon de la diversnaciaj kontrolintoj, kaj tiel ne malutilas al la internacia ĝuebleco de la kolektaĵo.

La recenzanto, kiu vivas en propramane, brik' al briko konstruita familia domo, jam plurajn tagojn pasigis inter kaj kun la paneloj de „Domfabriko", kaj formetinte siajn antaŭjuĝojn — devas rekoni, ke la perpanela konstruado estas ne nur ekonomia, sed la hejmoj tiel faritaj krom la utileco povas havi ankaŭ ĉarmon — pro kio rekomandinte la menciitan libron mi plenumas ne sole taskon de la recenzanto, sed esprimas samtempe mian esperon pri la disvastiĝo de tiu ĉi libro.

M. F.

SAOTOME Katumo: Danjo en Vjetnamio. Tradukita de membroj de Ikeburo Esperanto-Societo. Ilustrita de ENDO Teruyo. Tokio, 1974. 46 p., 18,5x16 cm. Prezo: 3,50 ned. gld.

Danjo estas vjetnamia knabino, kun kiu la aŭtoro konatiĝis en 1971 en Budapeŝto, ĉe packunveno, kiam ŝi estis 13-jara. El la konatiĝo naskiĝis amikeco, kaj Danjo, reveninte al Vjetnamio, ofte skribis al Saotome.

La sorto de Danjo, bedaŭrinde, tute ne estas unika. Kiel infano ŝi devis havi spertojn terurajn: la patrino mortis kaj de sub ŝia kadavro Danjo savis sian 2-jaran fratineton. La malpura milito faris ŝian infanaĝon seninterrompa inkubo.

Saotome prezentas la historion en tono simpla, sincera, emocianta. Mankas grandaj vortoj, mankas pritrakto kaj vicigo de konataj politikaj argumentoj, tamen, tiu ĉi eta verko pli laŭte krias por la justo de Vjetnamio, ol deko da oficialaj manifestoj. Kaj ne nur por la justo de Vjetnamio, sed por la justo de la tuta homaro, por la nepreco de paco, sole inda al la homo.

V. B.

HUMURO

Ĉion sialoke. Sinjoro en poŝtoficejo provas skribi depeŝon per la plumo metita por la publiko, sed la plumo kraketas, skrapas, ŝprucigas, nur ne skribas. Fine kolere li ŝovas ĝin sub la nazon de postgiĉeta poŝtoficisto:

— Diru, ĉu ne per tiu ĉi plumo Napoleono subskribis la Vienan packontrakton?

El post la giĉeto serioze sonas la respondo:

— Informado ĉe la giĉeto n-ro sep.

Seanco. Ie en Brazilo, la trista vidvino vizitas spiritisman seancon kaj vokas la spiriton de sia edzo. Kiam ĉi tiu aperas, ŝi demandas:

— Kaj diru, ĉu vi nun estas feliĉa?

— Jes, tute feliĉa.

— Pli feliĉa, ol kiam vi vivis kun mi surtere?

— Multe pli feliĉa.

— Ĉu vi povus diri ion pri tio, kiel oni vivas tie en la ĉielo?

— Kiel do en la ĉielo? Mi estas en la infero.

Koleginoj. Du kantistinoj konversas:

— Mi asekurigis min je kvinmil dolaroj kontraŭ la perdo de mia voĉo — diras la unu.

— Grandioze! — diras la alia. — Kaj kion vi faris per tiu grandega sumo?

Korespondi deziras

El Italio: Maria Grazia FORNARETTO, 11-jara k-ino, Via Guglielmo Silva 33, 20 149 Milano. Mario REBECCHI, 13-jara k., Via Antonia Pozzi 5, 20 149 Milano. Nicoletta RIMOLDI, 11-jara k-ino, Via Alcuino 5, 20 149 Milano. Danilo PEREGO, 12-jara k., Scuola Golorni, Via Paolo Uccello 1/A, Classe II B, 20 148 Milano. Robert HEROLD, 13-jara k., Via Albani 69, 20 148 Milano. Antonino IZZO, 26-jara, Via F.lli Cervi 19, 20 046 Biassono (Milano). Aldo FOÁ, 24-jara, Via Gulli 19, 20 147 Milano. Gisella MAULINI, Cusago 275, 20 100 Milano. Diego REBEZ, Via Procaccini 544, 20 100 Milano. Krome: 20 knaboj 15—18 jaraj, Corso di Esperanto, Liceo Carducci, Via Beroldo 9, 20 127 Milano.

El Hungario: ifj. János MIHÁLY, 6630 Mindszent, Mikszáth K. 20., dez. kor. kun sovetaj, kubaj, japanaj, meksikaj, hispanaj kaj germanaj esp-istoj.

El Pollando: Zbigniew SIDOR, 85—319 Bydgoszcz, ul. P. Findera 2/89, 30-jara laboristo-pentristo, dez. kor. kun la t. m. pri foto, muziko. Jerzy PODBIELSKI, 65—229 Zielona Góra, Dzierzynski str. 20/58, juristo, dez. kor. kun samfakuloj precipe pri mastruma juro kaj arbitracioj. Li serĉas Plenan Gramatikon, interŝanĝe de la dulingva „La Dia Komedio" aŭ aliaj libroj.

LEHEL

L~230 **

temperaturo de profunda fridkesto: —12°C

garantio por 2 jaroj

prezo: 5 900,-FT

Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR

NOVAĴO

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en nia vendejoj en Budapeŝto:
I. Hess András tér 3
VI. Népköztársaság útja 37